

Prezo: 7 €

[www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)

Majo - Junio 2016 | n-ro 05-06 (1331-1332)



# *Sennaciulo*

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!



## Renversa Universo

Mi provis jam delonge, esprimi min per-verse  
kaj kredis inon nepra al forto de inspiro  
Sed tuj post la stariĝo en muz' de l' amatino,  
Terure ĉio fuŝe funkcias tut-inverse!

Duone dias muzo, sed agas plendiverse:  
Sub sia prema trudo, senĉese kun obstino,  
Ŝi krude min verkigas ajniste sen vespiro  
Per versoj kiuj ĉiam incitas plej perverse...

Kaj kiam por eskapi, ripoze mi prozumas,  
Kun tuja *koro roka*, riproĉe l' *muzo zumas*  
Ŝtonece l' *karbo brakas*, elektre l' *pilo lipas*...

Fatrase, ĉiuj pecoj en siaj *maloj lamas*!  
Ne ĉio tamen misas: malve! plu *mamoj mamas*  
kaj pro palindromemo, inversa *piĉo ĉipas*...

**Ne mateno,  
bone tamen!**



SERGE SIRE

"Perverse", SAT-EFK 2014

Vidu ankaŭ Kontrepetraĵ rimoj – paĝoj 23-24



## Printempa fido

Vekiĝis softe la aer'.  
Ĝi flirtas, teksagas sur la ter'  
kaj kreas verdon nun sen fino.  
Ho, freŝodor', sonad' sen lim'.  
Nun estu – koro – do sen tim'.  
Turniĝi devos la destino.  
Pli belas la mond' post ĉiu tag'.  
Ne estas limo de l' imag'.  
Floradas nun sen fino.  
Floradas eĉ en fora val'.  
Forgesu – kor' – pri via gal'.  
Turniĝi devos la destino.

LUDOVIKO UHLAND

Tradukis Cezar



## REDAKTANGULO

Karaj legantoj,

Jen via gazeto unuafoje en tutkolora vesto! La evoluo de la presad-kondiĉoj ebligas ĉi tiun kvalitan plibonigon sen tro alta kresko de la presokosto, do la plenumkomitato decidis profitigi ĉiujn pri tio. Tiel jam dum la kongreso eblos ekbilanci pri tio, kaj pripensi kiel plej oportune utiligi ĉi-tiun novan eblecon.

Migrado el militzonoj daŭre restas kruele aktuala temo, kaj logike estas abunde traktita en la ĉi-monata temdosiero. Hazarde pluraj kamaradoj sendis ankaŭ kontribuojn pri la sociopolitikaj okazaĵoj el mezoriento, kiuj ebligas pripensi ne nur la simptomojn, sed ankaŭ la pli profundajn kaŭzojn de la nunaj homaj movoj ĉirkaŭ Mediteraneo. Aldonaj artikoloj pri UN kaj rilatoj inter mondpotencoj donas eĉ pli vastan perspektivon.

Aldone al artikoloj pri Kubo, sindikatismo, ekologio kaj beletro, novaĵoj el du LEA-oj donas praktikajn ekzemplojn pri klopodoj disvastigi nuntempan laboristan literaturon pere de Esperanto.

Fine, en ĉi tiu numero aperas la jarraportoj de la PK kaj de la ĜK-aro, pridiskutotaj dum la venonta kongreso. Vi en ili trovos klarigojn pri la malfruo en la ekspedo de la numero 3-4 de Sennaciulo. Jen plia okazo rememorigi, ke la bonorda apero de la SAT-organo dependas de ĉies kontribuoj, ĉu pri la enhavo, ĉu pri la organiza flanko.

La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2017: 31a de decembro 2016

Sennaciulo 9-10 (1335-1336): 20a de julio

Sennaciulo 11-12 (1337-1338): 20a de septembro

Frontpaĝa bildo de Diana Riŝar

# Enhavo

## TEMDOSIERO: MIGRADO

- 4 Enmigrantoj amase sturmas Eŭropan Union MIR-KO
- 7 IDOMENI SEN RODIN
- 8 Interŝanĝo pri atencotemo MICHEL MARKO
- 9 Deturni la rigardon NXC
- 9 Zamenhof pravis (3) ROGER CONDON

## MONDPOLITIKO

- 12 De la mizero de la Unuiĝintaj Nacioj LIZAS WELT
- 13 La malbonvola spirito Putin SONJA VAN DEN ENDE
- 14 Kubo: granda sukceso kaj malgranda malsukceso SANTIAGO ALBA RICO
- 16 ELAM: Sano el Kubo por la Mondo AMPARADO CISNERO ROVIRA

## SINDIKATISMO TUTMONDA

- 17 Kolombio: Liberigu tuj la profesoron kaj sindikatanon Miguel Ángel Beltrán
- 17 Gambio: justeco por Sheriff Diba

## HISTORIO

- 18 13 monde famaj Civitanoj de la Mondo alvokas SENDITA DE MONDCIVITANA ASEMBLEO

## EKOLOGIO - MEDIO

- 19 Daŭripovo – Resilienco – Transformo (Superrigardo) WOLFGANG GUENTHER

## BELETRA ANGULO

- 2 Renversa Universo SERGE SIRE
- 2 Printempa fido LUDOVIKO UHLAND
- 22 Kafka: Antaŭ la leĝo... CEZAR
- 23 Karaj rimoj? UWE STECHER
- 35 La flugo MIGUEL FERNÁNDEZ

## TRA ESPERANTIO

- 25 La KancerKliniko ĴAK LE PUIL

## INTELEKTA MEMDEFENDO

- 26 Enigmoj SERGE SIRE

## EL LA LEA-OJ

- 27 Hispana kritika poezio en Esperanto MIGUEL FERNÁNDEZ
- 28 Eta raporto pri la laboro de Sveda Laborista Esperanto-Asocio

## EL LA LETERKESTO

- 33 Dosiero de Subjekto N-ro 1218 - Rakonto de Bulgara Anarkiisto

## EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 29 Tereza Kapista (1930-2016) DIMITRIJE JANIČIĆ
- 30 Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2015 ĝis Majo 2016
- 32 Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2015-2016
- 33 Dumkongresaj laborgrupoj
- 34 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:  
[sennaciulo.redaktejo@gmail.com](mailto:sennaciulo.redaktejo@gmail.com)

# Enmigrantoj amase sturmas Eŭropan Union

## La celoj de eŭropa enmigrado

Enmigranto estas eksterlanda alveninto, kiu ekloĝas daŭre en novaj setlokondiĉoj. De kelkaj jaroj la nombro da eŭropaj enmigrantoj amase kreskas, ĉar en multaj nordafrikaj kaj proksimorientaj landoj la vivo de loĝantaro konsiderinde malpliboniĝas. Parto de afrikaj kaj aziaj landoj estas atakita per defensiva kaj interna milito aŭ estas tuŝita per kaoso kaj ekstrema mizero kio deprimas kaj desperigas parton de la loĝantoj. Ili inkliniĝas fuĝi for de gravega situacio, ĉar minacas eĉ mortiga danĝero. Ili revas pri pli bonaj vivkondiĉoj, kiujn ili esperas trovi eksterhejme.

Lige kun tiuj revoj, la afrikaj kaj aziaj rifuĝantoj antaŭ ĉio celas enmigri al Eŭropo. Laŭleĝa alveno al tiu kontinento estas komplika kaj malfacila pro azilaj procedoj kaj enmigraj reguloj. Do, multaj enmigrantoj decidas nelaŭleĝe alveni al la bordoj de eŭropaj landoj. Poste, la virtuala enmigranto esperas profiti de la malfermitaj landlimoj de Eŭropa Unio kaj intencas travojaĝi al la lando, kie li plej facile ricevos azilon, loĝejon, monan subvencion kaj poste laboron. Eŭropan Union kreas nuntempe 28 landoj de okcidenta kaj centra Eŭropo, menciitaj en la tabelo 2.

La servoj de kontrabandistoj	Elspezoj en eŭroj
Unu sidloko sur mara trafikilo, de Afriko al Eŭropo	1000
Unu sidloko en bagaĝtaksio, de Budapeŝto (Hungario) al Vieno (Aŭstrio)	300 – 400
Unupersona vojaĝo de Sirio al Germanio aŭ de Egiptio al Italio	2 500
Pontona marvojaĝo de turkia marbordo al grekia najbara insulo	500 – 1000
Transpaŝo de turkia-bulgara ŝtatlimo per unu persono	500
Unu aviadila bileto de Grekio al Germanio kun falsitaj dokumentoj	15 000

Tabelo 1. Elspezoj pro pagoj al kontrabandistoj

Du kategorioj de enmigrantoj alvenas Eŭropan Union:

- rifuĝantoj, kiuj estis persekutataj en hejmlandoj pro politikaj, naciecaj, religiaj, rasaj kaj aliaj neekonomiaj kaŭzoj,
- ekonomiaj enmigrantoj, kiuj intencas plibonigi siajn vivkondiĉojn kaj akiri sufiĉe bonstatan vivon.

Eŭropa Unio decidis, ke la rifuĝantoj havas senrestriktajn azilrajtojn sur la Unia teritorio, kaj la ekonomiajn enmigrantojn oni povas akcepti nur en la okazo de propraj urĝaj laborejaj bezonoj.


## La ĉefaj vojoj de enmigrado

La eŭropaj enmigrantoj atingas la kontinenton laŭ kvin ĉefaj vojoj (bildo 1):

1. okcidenta mediteranea vojo,
2. centra mediteranea vojo,
3. orienta mediteranea vojo,
4. balkana vojo,
5. orienteŭropa vojo.

La afrikaj kaj aziaj rifuĝantoj migras tra tero kaj maro al Eŭropo, kiu estas por ili “La Promesita Lando”. Antaŭe ili devas trairi la teran vojaron kun dezertoj, malpacoj, ribeloj, anarkioj, internaj militoj por alveni ĝis la maro, kie kontrabandistoj kaŝveturigas ilin al eŭropaj marbordoj (bildo 2).

La okcidenta mediteranea vojo estas uzata de rifuĝantoj el Okcidentafriko (ekz. el Maroko, Alĝerio, Maŭritanio, Malio, Kameruno, Niĝerio) kaj ili trafas Hispanion. La plej potenca torento da rifuĝintoj formis en la jaro 2014 la centra mediteranea vojo. Grupiĝis enmigrantoj el Libio, Egiptio, Sudano (ĉefe el Darfuro kaj Sudsudano), Etiopio, Eritreo, Somalio kaj la landoj de Orientafriko. Ilin transprenis libiaj kontrabandistoj, kiuj kaŝveturigas ilin tra Mediteraneo al Italio. La orienta mediteranea vojo servas al elmigrantoj el Orientafriko, Arabio, Jemeno kaj parto de Proksima Oriento. La utiligantoj de la orienta mediteranea vojo trapasas Mediteraneon kaj albordeĝas sur la grekia teritorio. La balkana vojo estas ĉefe surtera vojo



Bildo 1



Bildo 2



Lando	Enmigrantoj totale (miloj)	Alvenintaj el ekster de Eŭropa Unio (miloj)	Enmigrantoj el loĝantaro (%)	Ĉefaj landoj de alvenantoj
Aŭstrio	1 057	539	12,4	Sirio, Afganio, Rusio
Belgio	1 264	434	11,3	Sirio, Afganio, Rusio
Britio	5 047	2 424	7,8	Pakistano, Eritreo, Irano
Bulgario	54	41	0,8	Sirio, Afganio, Irako
Cipro	159	48	18,6	Sirio, Ukrainio, Egiptio
Ĉeĥio	434	261	4,1	Ukrainio, Sirio, Vjetnamo
Danio	397	233	7,1	Sirio, Eritreo, senŝtatoj
Estonio	195	187	14,8	Ukrainio, Rusio, Sudano
Finlando	207	122	3,8	Irako, Somalio, Ukrainio
Francio	4 157	2 706	6,3	D.R. Kongo, Rusio, Bangladeŝo
Germanio	7 011	3 912	8,7	Sirio, Serbio, Eritreo
Grekio	837	649	7,7	Afganio, Pakistano, Sirio
Hispanio	4 677	2 685	10,1	Sirio, Ukrainio, Malio
Hungario	140	59	1,4	Kosovo, Afganio, Sirio
Italio	4 922	3 480	8,1	Niĝerio, Malio, Gambio
Irlando	545	171	11,8	Pakistano, Niĝerio, Albanio
Kroatio	32	21	0,7	Alĝerio, Sirio, Pakistano
Latvio	305	299	15,2	Kartvelio, Ukrainio, Sirio
Litovio	21	16	0,7	Kartvelio, Afganio, Ukrainio
Luksemburgo	249	34	45,3	Bosnio-Hercegovino, Montenegro, Kosovo
Malto	25	11	5,9	Libio, Sirio, Somalio
Nederlando	735	330	4,4	Sirio, Eritreo, senŝtatoj
Pollando	101	71	0,3	Rusio, Ukrainio, Kartvelio
Portugalio	401	301	3,8	Ukrainio, Maroko, Sieraleono
Rumanio	73	52	0,4	Sirio, Afganio, Irako
Slovakio	59	12	1,1	Afganio, Sirio, Ukrainio
Slovenio	97	80	4,7	Sirio, Afganio, Pakistano
Svedio	687	385	7,1	Sirio, Eritreo, senŝtatoj

Tabelo 2. Enmigrantoj en Eŭropa Unio

por rifuĝantoj el Sirio, Libano, Irako, Irano, Turkio, Afganistano ktp., kiuj kutime trapasas mallongan maran distancon inter Turkio kaj grekaj insuloj. La plej malofte uzata vojo estas la orienteŭropa vojo, grupiganta enmigrantojn el postsovetiaj respublikoj, kaŭkazaj terenoj kaj parte el proksimorientaj landoj.

Oni elektas la vojon depende de:

- posedataj monrimedoj,
- distanco de la vojo,
- la azilrajta politiko de landoj,
- la organizo de kontrabandistoj kaj iliaj ofertoj,
- la loko de enmigrantaj azilcentroj,
- obstakloj, malhelpoj kaj baroj sur la vojo,
- veteraj limigoj.

Oni povas rimarki, ke konstruo en la jaro 2012 de la 12-kilometrojn longa palisaro ĉe la grekia-turkia ŝtatlimo, ŝanĝis la surteran balkanan vojon al mara-tera vojo inter turkia marbordo kaj grekaj insuloj. Malfacilaĵoj kun trapaso de Mediteraneo kaj plua kaoso en Sirio kaj Irako formis en la jaro 2015 potencon balkanan vojon.

## Dramaj vojaĝoj al Eŭropo

Kutime la enmigrantoj havas eksterordinare dramajn vojaĝojn al Eŭropo. Multaj ekonomiaj enmigrantoj kaj rifuĝantoj ŝparadas eĉ la tutan vivon por la vojaĝo al pli bona vivo. Ofte la teran vojon akompanas kontrabandisto postulanta larĝmanan pagon. La memstaraj enmigrantoj akceptas dum vojaĝo ĉiun malalte pagatan provizoran laboron. Ofte ili estas atakitaj kaj priŝtelitaj. La virinoj estas ekstreme endanĝerigitaj dum riska vojaĝo tra Afriko. La plimulto da enmigrantinoj vojaĝantaj sen viraj protektantoj estas seksperfortataj, kaj tio koncernas eĉ 13-jaraĝaj knabinoj.

La mara traveno de Afriko al Eŭropo kutime efektiviĝas kun kontrabandisto ricevanta ĝis 1000 eŭrojn por sidloko sur mara trafikilo (bildo 3). Boatoj kaj ŝipoj uzataj tiucele kutime estas malnovaj, malzorgitaj, troŝarĝitaj kaj iufoje sinkas en Mediteraneon. La marlimo de Eŭropa Unio estas tro

danĝera, ĉar dum kelkaj jaroj dronis jam kelkmil enmigrantoj. Tamen senĉese ili provas tiun rimedon por alveni Eŭropon. Ofte ŝipoj veturigantaj enmigrantojn krozas multajn horojn sur Mediteraneo apude de italiaj aŭ grekaj havenoj. Havenestroj ofte malakceptas alvenpeton de ŝipestro, timante ke post alterigo la enmigrantoj tuj postulus azilon.

## Kontrabandista negoco

La enmigrantoj al eŭropa kontinento ofte estas sufiĉe frue informitaj pri kian helpon ili povas ricevi en diversaj eŭropaj landoj. Priinformas ilin:

- parencoj kaj konatuloj, kiuj pli frue enmigris al Eŭropo,
- kontrabandistaj interretaj invitoj por utiligi iliajn servojn.

La kontrabandistoj komunikas pri la subteno kiun la enmigrantoj obtenos en riĉaj landoj de Eŭropa Unio. La detaloj aparte distingas:

- la periodon de valideco de restadpermeso kaj tempospacon de ĝia akiro,
- la enmigradan monhelpon de la ŝtato,
- ŝtatan loĝigan helpon,
- la probablan venigon de familioj.

La kontrabandista negoco estas tre profitodona, ĉar ĝi alportas jaran gajnon de multaj centmilionoj da eŭroj. Partoprenantoj de la negoco estas: boatestroj, ŝoforoj, ŝipestroj, kutranoj, perantoj, agentoj, tranoktejestroj kaj multaj aliaj. La enmigrantoj pagis al la kontrabandistoj ekde la jaro 2000 pli ol 16 miliardojn da eŭroj. Iaj unuopaj elspezoj de la enmigrantoj pro paŝoj per la kontrabandistoj aperas en la tabelo 1.

## Nombroj da alvenintaj enmigrantoj

La enmigrantoj sturmas Eŭropon jam de multaj jaroj. Evidenta magneto estas la eŭropaj socialaj privilegioj, eĉ unikaj en la mondo, ĉar neniu kontinento proponas tiel vastan socian helpon por loĝantoj. Nuntempe jam vivas sur la tereno de Eŭropa Unio pli ol 30 milionoj da alvenintaj enmigrantoj. La tabelo 2 montras la totalan nombron da enmigrantoj vivantaj en ĉiuj landoj de Eŭropa Unio





**Bildo 3**

kaj nombro da alvenintoj al ĉiu lando el ekster Unio kaj la landoj de ilia deveno. La plej multnombraj enmigrantoj troviĝas en Germanio, Britio, Francio, Italio kaj Hispanio. Absoluta plimulto da novvenintoj direktadis al Germanio pro antaŭlonge deklarita "politiko de gastado" kaj pro la plej multaj socialaj privilegioj en Eŭropo (bildo 4).

Lasttempe la nombro de enmigrantoj multiĝas. En la jaro 2014 al Eŭropa Unio alvenis ĉ. 270 miloj da enmigrantoj (vidu la tabelon 3). Pli ol duono de tiuj personoj trapasis Mediteraneon laŭ la centra mediteranea vojo (bildo 1). En la jaro 2015 la nombro da enmigrantoj plimultiĝis ĉirkaŭ kvaroble, ĉar alvenis Eŭropon pli ol unu miliono da personoj (tab. 3). La direkto de trapasado ŝanĝiĝis, ĉar 847,8 miloj da personoj alvenis laŭ la balkana kaj la orienteŭropa vojoj (bildo 5), ĉefe de Turkio al grekaj insuloj.

Tiu unu miliono da alvenintoj estas tiel ŝoka nombro, ke ĝi malorganizis la laboron de ĉefaj ŝtataj sociaj administracioj kaj kaŭzis fremdlandfobian etoson en multaj eŭropaj landoj. La Eŭropa Komisiono de Eŭropa Unio deklaris, ke 60% de

enmigrantoj alvenintaj en la fino de 2015 ne efektivigis la azilkriteriojn, ĉar ili estis kvalifikataj kiel ekonomiaj enmigrantoj.

La membroj de Eŭropa Unio malfacile interkonsentas kion fari kun ĝisnunaj enmigrantoj kaj ankaŭ kiel kontraŭagi estontajn alvenantojn. Kelkaj prognozaj institucioj sugestas, ke en la jaro 2016 alvenos al Eŭropa Unio ankaŭ pli ol 1 miliono da rifuĝantoj.

## Debatoj en Eŭropa Unio

La landoj de Eŭropa Unio vigle diskutas pri problemo de enmigrado. La debatoj koncernas same amason da alvenantaj homoj kaj ankaŭ naturan bezonon de maljuniĝantaj eŭropaj socioj, kie ofte necesas trovi urĝan kompletiĝon. La plimulto de landoj faras ĉion eblan por limigi enmigradon sed parto de eŭropaj landoj faras kontraŭe kaj volonte kompletigas proprajn demografiajn perdojn. Ekzemple en Germanio jam vivas pli ol 7 milionoj da enmigrantoj kaj nur en la jaro 2015 alvenis preskaŭ 1 miliono da alilandaj laboruloj. La kovrado de germana ĉiujara homa deficiito

(demografia malprofito) necesigas ĉiujare ensorbadon de duonmiliono da eksterlandanoj.

La Eŭropa Komisiono de Eŭropa Unio intencas precizigi unuforman enmigradan politikon. La afero estas disputebla kaj implika, do oni analizadis multajn diversajn proponojn, ekzemple:


- la prezentado de enmigrantaj azilpetoj al Eŭropa Unio, ankoraŭ antaŭ la forlaso de hejmlando,
- la patrolado de nordafrikaj bordoj kaj savado de rifuĝantoj, fare de afrikaj ŝtatoj (Libio, Egiptio, Tunizio, ktp.) kun financa helpo de Eŭropa Unio,
- la organizado de enmigrantaj restadejoj en la landoj najbaraj al hejmlando de rifuĝantoj,
- la listigo de t.n. sekuraj landoj, kie oni ne persekutas loĝantojn (alvenanton el la sekura lando al Eŭropa Unio oni povas trakti nur kiel ekonomian enmigranton),
- la simpligo de ĝisnunaj komplikaj azilreguloj,
- plirapidiga deportado de ekonomiaj enmigrantoj al iliaj hejmlandoj, se ili ne ricevis azilon kaj laborpermeson en Eŭropa Unio,
- la ŝanĝo de ĝisnuna ordono, ke oni povas azilrajti nur la personon

Vojo	Alvenintoj en la jaro 2014	Alvenintoj en la jaro 2015
Okcidenta-mediterranea	7 842	3 600
Centra-mediterranea	170 757	152 800
Orienta-mediterranea	50 831	
Balkana	43 357	847 800
Orienteŭropa	1 270	
Sume	274 057	1 004 200

**Tabelo 3. Enmigrantoj alvenintaj en 2014-2015**



**Bildo 4**



**Bildo 5**



## Konkludoj

La ondoj de enmigrintoj superverŝas eŭropan kontinenton tiel fortege, ke eŭropaj ŝtataj estroj konsideras limigon de ilia aliro al Eŭropa Unio. La germana “politiko de gastado”, kiu kaŭzis alvenon de preskaŭ unu miliono da enmigrintoj, estas forte kritikata. En Svedio, Britio, Francio kaj kelkaj aliaj landoj la nombro da alvenintoj superregas eblecon de ilia vivteno. La landoj de centra kaj orienta Eŭropo malvolonte akceptas alvenon de rifuĝantoj. Plu estas deviga la humaneca malfermo de ŝtatlimoj por rifuĝantoj el landoj tuŝitaj per milito aŭ kaoso. Tamen la limgardistara kontrolo, kiun Eŭropa Unio volas enkonduki, devos radikale malfaciligi trapaŝon de eŭrop-unia limo al ekonomia enmigrinto.

La landoj de Eŭropa Unio havas koliziantajn vidpunktojn rilate al azilpolitiko kaj akceptado de rifuĝantoj. La egoista maniero trakti enmigrintan aferon de specifaj landoj ne esperigas la konsekvencon kaj rapidan solviĝon de enmigrinta krizo.

MIR-KO

alvenantan al eksteraj ĉelimaj landoj de Eŭropa Unio,

- la financado de investaĵoj en hejmlandoj de enmigrintoj, kie oni povas redukti ilian senlaborecon,

- la malgrandigo de monsubvencioj por enmigrintoj atendantaj azilon aŭ ĉiutaga donado de nutraĵo anstataŭ mono,

- la fermado de internaj ŝtatlimoj en Eŭropa Unio dum urĝaj enmigraj eventoj,

- la dispartigo de antaŭe alvenintaj enmigrintoj (ĉefe el Grekio kaj Italio) inter la landoj de Eŭropa Unio,

- premado de la ekstereŭropaj landoj por pli granda akceptado de rifuĝantoj,

- la stabiligo de kaoso kaj malfavoraj vivkondiĉoj en hejmlandoj de enmigrintoj kun la helpo de Eŭropa Unio,

- oficiala rekono ke rifuĝanto, kiu ian tempospacon vivis en sekura lando (do lasttempe ne estis persekutata) ne havas azilrajton en Eŭropa Unio,

- la hermetikigo de eksteraj ŝtatlimoj de Eŭropa Unio por likvido de nekontrolata sturmo de enmigrintoj,

- la organizado de enmigradaj akceptocentroj en ŝtatoj ekstere de

Eŭropa Unio, kie la enmigrintoj estos rapide identigitaj, sendanĝerece kontrolataj kaj apartigataj je rifuĝanta kaj ekonomia grupoj,

- interkonsento kun landoj, kie vivas multaj enmigrintoj por haltigi ilian direktiĝon al Eŭropo,

- la likvido de organizitaj kontrabandistaj grupoj sur la tereno de Eŭropa Unio,

- la formiĝo de efika gardorganizaĵo de teraj kaj maraj limoj de Eŭropa Unio,

- pagoŝarĝado de enmigrintoj por vizitado de integrida kaj alia kurso organizata en eŭrop-unia lando,

- la enkonduko de restriktita leĝo malpermesanta alvenon de familianoj al rifuĝanto.

Oni provis apliki la kelkajn supre menciitajn proponojn sed sen sukcesaj efektivigoj. Al tiuj provoj apartenis: periodaj kontroloj de trapasantoj la internajn ŝtatlimojn, la interparoloj de Eŭropa Unio kun Turkio intencante haltigi amasan invadon de rifuĝantoj el Turkio, la decido de la Eŭropa Komisiono pri transloĝigo de antaŭe alvenintaj 160 miloj da rifuĝantoj al Grekio kaj Italio, dividante ilin inter ĉiuj ŝtatoj de Eŭropa Unio.

# IDOMENI

Tio kio okazas en la tendaro de Idomeni (Grekio) estas skandala kaj netolerebla. Dekmil sirianoj kaj alilandanoj fuĝintaj de la morto suferas tie de monatoj en la ŝlimo, en la frosto, sen riparo, kun infanoj, gravedaj virinoj, maljunuloj, malsanuloj. Se ili proksimiĝas al la barilo el pikildrato starigita laŭ 200 km far la makedona estraro – laŭ instigo kaj aprobo de Bruselo (eŭropa estraro) – la greka polico repuŝas ilin per bastonoj, urtikantaj ŝprucoj, larmigaj gasoj, akvokanonoj. La samo okazas en dekoj da lokoj laŭ la eŭropaj landlimoj. Baldaŭ oni komencos pafi kontraŭ ili. Tio jam okazis en Libio. Fakte ne mankas ekstremdekstraj deputitoj de diversaj parlamentoj, kiuj eksplicite proponas “pafi je alto nulo” por elimini tiujn “parazitajn, kiuj rifuzas labori”.

Tremigaj deklaroj replikantaj la hororan naziisman ideologion. Cetere, tiuj estas la atendeblaj psikologiaj rezultoj de la dominanta novliberalismo. Ĝi semas senlaborecon kaj mizeron, kolektas malamon. Kaj la viktimoj estas, kiel kutime, la plej mizeraj: romaoj, enmigrintoj, mizeruloj, trampo.

Tre dubindas ĉu ni eŭropanoj ankoraŭ rajtas konsideri nin “*la plej klera-civilizita kontinento*” de la terĝlobo. Jam antaŭ kelkaj jardekoj ni praktikis unu el la plej teruraj genocidoj de la homa historio, la holokaŭsto; kaj nun, en la nova jarcento, ni montriĝas kruelaj pli ol bestoj, sovaĝuloj senaj je ajna sento de homa amo kaj solidareco. Bedaŭrinde niaj popoloj preskaŭ silentas aŭ eĉ aliĝas al la plej ekstremaj rasismaj

sentoj de malamo dissemataj far faŝistemaj ĉarlatanaj movadoj – ekzakte kiel okazis dum la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento. Ekzistas ja ankaŭ kuraĝa oponenta minoritato; ĝi praktikas asiston laŭ siaj ebloj kaj energie protestas (pro tio ĝi estas akuzata pri “defetismo” se ne pri “terorismo”). Sed bedaŭrinde ĝia voĉo estas febla, neaŭdata de la granda homamaso. Eĉ la italoj – nepoj kaj pranepoj de 20 milionoj da migrantoj en Usonon, Francion, Belgion, Aŭstralion, eĉ ili plejparte somnolas en la normala ĉiutaga rutinado. Nur multaj grekaj kaj italaj suduloj – ekz. la noblaj, malriĉaj loĝantoj de insulo Lampeduza kaj de pluraj grekaj insuletoj – montras kompaton, solidarcon, gastigemon kontraŭ la rifuĝantoj atingantaj ĉiutage iliajn plaĝojn post



dramaj navigadoj. Sed ĝenerale en tuta Eŭropo vidiĝas nenia spuro pri la amasaj demonstracioj kiuj plenigis niajn placojn en la 60-aj kaj 70-aj jaroj. Parto de nia junularo ŝajnas anemia, interesata ĉefe pri motorcikloj, rokenrolo, tablojdoj, futbalo ks: tute seninteresa pri sociaj problemoj, anestezita, mitridatizita. Radio, televido, gazetaro apenaŭ tuŝas la temon. Tion atestas ekz. la lasta numero (25-03-2016) de “*Il Venerdì*”, la semajna revuo de la ĉefa itala ĵurnalo “*Repubblica*”: en 150 paĝoj oni ne trovas unu vorton pri la humaneca tragedio kiu okazas sub niaj okuloj: neglektinda apartaĵo ne meritanta la atenton de seriozaj adoltoj.

Dume la eŭropa estraro proponas al tiu migranta popolo peteganta helpon unu solan alternativon: esti deportata en la lagerojn [koncentrejojn – NdR] pretigatajn en Turkio far generalo Erdogan. Ĉi lasta estas renoma sangavida tirano, samkiel lia kolego, generalo al Sisi de Egiptio: ili enkarcerigis, torturigis, mortigis milojn da homoj – inkluzive la italan junulon Giulio Regeni, feroce torturita dum semajno kaj fine murdita. Aliflanke ili estas niaj plej gravaj liverantoj de



### Infanoj ĉe Idomeni

petrolo kaj de komercaj varoj valorantaj miliardojn da eŭroj. Tio klarigas kial ili akiris la apogon kaj amikecon de la eŭropaj gvidantoj. Cetere, Erdogan sin deklaris preta liberigi nin eŭropanojn disde tiu aro el ĉifonuloj kiu minacas nian trankvilon. Por lin konvinki, Bruselo jam donacis al li tri miliardojn da eŭroj, donacos

aliajn tri, promesis, ke baldaŭ Turkio povos iĝi membro de Eŭropa Unio. Nekredeble sed vere. Mi hontas kiel eŭropano, esperantisto – pli precize kiel homo.

SEN RODIN

Veano, aprilo 2016

# Interŝanĝo pri atencotemo

**Atenco okazis en Turkio. Nun komenciĝis debato inter Ĝemil Kessous kaj Vito Markov: ĉu levi mondan solidarecon? (Sennaciulo Novembro – Decembro 2015, p. 9-10)**

Laŭ mi, la ĉefa demando kuŝas tiel: ĉu la turka registaro portas respondecon?

En diversaj landoj okazis, ke por firmigi sian potencon, intensigi la subpremon per armeo kaj polico aŭ simple kaŝi la fiaskon de la politiko, regnaj estroj sekrete organizas atencojn aŭ socian konfuzon. Foje, observantoj rimarkis, ke dum manifestacio policistoj ĵetis incendiajn grenadojn sub veturilojn, rompis montrofenestrojn de magazeno, komencante violenton kredigante, ke manifestaciantoj faris tion. Tiel, subpremo, aresto kaj puno de oponentoj akuzitaj je tumulto kontraŭ publika sekureco praviĝas. Eĉ, kaŝmilitistojn kaptitajn de nov-zelanda polico pro murdo per bombado de ŝipo, la franca ŝtato reaĉetis: anstataŭ

kondamni ilin, ĝi altigis ilian rangon, ĉar ili plenumis sian mision malhelpi la kontraŭemulojn de nukleaj provadoj.

Ekzistis ankaŭ onta teroristo, kiun usona sekretservisto dungis. Poste oni montris lin kiel danĝeran mondan malamikon de la homaro kaj nun oni preskaŭ reestimas liajn heredantojn, ĉar ili ŝajnas konkurenci aliajn teroristarojn.

Mi memoras ankaŭ, ke kelkaj usonaj prezidentoj kuniĝis al la sekreta societo fondita en 1832 “Kranio kaj tibioj”, kies celo estas “agadi en ombro por regado de jud-kristanaj kaj blankaj potenculoj per milito, teroro kaj monpremo”. Eble ekzistas feŭdistoj novaj, kiuj ombre direktas politikistojn, la surscenejajn aktorojn elektitajn per “demokrataj” balotoj – *Bush* (Buŝ) patro kaj filo bone konas tiun sekretan sektion.

Alia punkto: kurdoj, malriĉaj popolanoj, sopiras trankvile vivi ekster multa konsumado. Tio estas ilia peko. Traktado farita de riĉlandoj disdividus

ilin en plurajn regnojn, kie en la tutaĵoj ili arigiĝas nur minoritate. Ĉiu regno strebas malaperigi kurdan proprajon por konverti tiujn homojn al konsumada moderneco gvidata de potencularo, kiu nome de la monda komunumo aprobatas.

Sama evento okazis en Kosovo. Ankaŭ tie, la popolanoj sopiris vivi ekster konsumad-frenezo kaj oni taksis ilin ne interesaj, do oni lasis krevi la absceson ĝis ekmilito, kiun Usono subtenis kaj partoprenis.

Ni eksciu, cerbo kaptita al ĉiama pli-konsumado pli obeeme submetiĝas. Por antaŭenirigi azenon oni pendigas karoton antaŭ la nazo. Timo pri milito kaj teroristoj pli efikas ol vipo. Sed vidu! La cerbo de rajdanto reduktiĝas al sopiro pri ĉiama pliigo de potenco. Azeno kaj rajdanto iĝas ununura ento dezertiĝinta je korvarmo. Feliĉe restas kelkaj “sociaj maldignuloj”, kiuj ne kuŝiĝas en la komunan pensadon de la reganta sistemo. Mi esperas.

MICHEL MARKO



# Deturni la rigardon

Milito. Urboj sieĝataj. Murdoj. Miloj da homoj fuĝantaj. Ĵurnalistoj enkarcerigitaj kaj ĵurnaloj fermitaj (kvar dum unu semajno); kaj la plejmulto de tiuj kiuj daŭre laboras deturnas la rigardon por, anstataŭ informi, plintensigi la militpropagandon. La prezidento de Turkio, Recep Tayyip Erdogan, agadas laŭplaĉe kaj nenio okazas. Al Turkio, al Erdogan, peti klarigojn neniu sin ĝenas. Neniu ĉef-aŭtoritato de la Eŭropa Unio denuncis la sisteman detruadon de Norda Kurdio (1).

Kruelan traktadon faris la EU-aŭtoritatoj kun Turkio. Turkio retenos la plejmulton de la siriaj rifuĝintoj – oni volas ke ĝi prenu denove tiujn kiuj ekmarŝis de tie –, malebligante ilian eniron en Eŭropon. Interŝanĝe, Eŭropo donos monon; neniu enmiksiĝos en la aferoj de la reformiste maskita Erdogan, ĉu temas pri la senmezura atako kontraŭ la kurdoj, ĉu temas pri alia rompo de la Homaj Rajtoj; eĉ ne pri la rilatoj kiujn li havas kun la Islama Ŝtato (du ĵurnalistoj estis enkarcerigitaj dum tri monatoj ĉar ili pruvis ke Turkio donacis armilojn al ĝihadistaj grupoj en Sirio);



la turkoj povos moviĝi sen vizo en la EU; kaj la senfinan intertraktadon por membriĝo en la EU oni pliakceligos.

Por la EU-aŭtoritatoj la problemo estas la migrantoj. Decidan kunvenon kun Turkio ili havas venontan lundon (\*). La kurdoj restos kaŝitaj en la keloj, pro timo je la bomboj. La Homaj Rajtoj same.

Notoj (nomoj en la kurda lingvo):

(1) Norda Kurdio / Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Jakes Goikoetxea.

(\*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 5an de Marto 2016a.

Tradukis: NXC. Marto 2016a.

MONDPOLITIKO

## Zamenhof pravis (3)

### Genocido, por ke vivu la Granda Israelo

#### Kio okazas en la vicoj de la israelaj soldatoj?

En Israelo la gravaj rimedoj de endoktrinigo realigitaj de la ŝtato jam, ĝis nun, sin montris tre efikaj. La sistema menstruado de homoj estas aplikita de la naskiĝa tago, ĝis tiu de la morto. La celo estas agi tiamaniere, ke soldatoj kaj kolonianoj havu, profunde enradikigitaj en siaj korpoj kaj mensoj,

ĝisostan abomenon kontraŭ palestinanoj. Tiuj lastaj, tute malhumanigitaj, are prezentataj kvazaŭ sovaĝuloj sen legitimeco, kiuj volas ekposedi la landon, kiu estas ilia propraĵo de ĉiam...

La estraro nun agas por organizi la sekvantan fazon de la etna purigado. Sed tiu antaŭeniro ne estas certigita! La junaj generacioj de judoj estas pli kritikemaj rilate al la cionismo kaj, malgraŭ ĉiuj antaŭzorgoj prenitaj por kaŝi la verajn eventojn je iliaj okuloj, la protesto etendiĝas, faras olean makulon...

Malfermante la ĵurnalon, miaj okuloj estas altirataj de informo: en Israelo, mortas pli da soldatoj per memmortigo ol per ago de milito!

Historie, la israelaj defendfortoj ĉiam devis elteni tre altan memmortigo-nivelon ĉe siaj membroj. Post la arma operacio kontraŭ Gazao, la kvoto atingis maltrankviligan nivelon, kiu plue plimalboniĝis kiam tri elitoj de la brigado "Givati" sekvis la saman vojon. La "Maariv" ĵurnalo raportis, ke la israela milita polico kondukas enketon por kompreni ĉi ege zorgigan fenomenon.

MAJO – JUNIO 2016 | Sennaciulo | 9



Sinjoro Hussin, loĝanto de Gazao, donas klarigon, kiu sufiĉe bone montras kiom terura estas la nuna situacio en Gazao: “La konduto de la israelaj brigadoj en la okupitaj palestinaj teritorioj estas tiel brutala, ŝoka, sanga, ke estas neeble por individuo, kiu havas ian konscion ĝin akcepti.”

Tiuj memmortigoj povas nur esti la konsekvenco de la faktoj raportitaj de multaj grupoj. “Rompi silenton” [1] publikigas la ĉefajn observojn, kiujn li registris pri la barbara konduto de la soldatoj de la israela armeo:

— Ili estas tute sendisciplinaj. Por trompi enuon, ili faras ion ajn kaj kondutas malbone. Ekzemple, dum gravega periodo de sekeco, ili prenas por celtabulo akvo-rezervujojn tiel senigante palestinanojn de provizoj de trinkebla akvo

— Dum operacioj, ili ĉiam vandalizas la palestinajn posedaĵojn.

— Ili uzas fosforajn pafaĵojn, tamen malpermesitajn de la internaciaj konvencioj, kontraŭ la civiluloj tute senarmaj kaj sen protekto.

— Eĉ, kiam ĉio estas trankvila, operacioj estas efektivigataj kontraŭ la palestinanoj por instigi, malstabiligi kaj, je la fino devigi ilin eliri.

— Civiluloj, viroj, virinoj kaj infanoj estas tre ofte uzataj kiel ŝildo dum progresoj de la militaj grupoj.



**Avital Leibovich**

La kolonelo Avital Leibovich, reprezentanto de la israela armeo, sen animstato, respondis al raportisto: “... La israela armeo havas etikajn valorojn sen iu ajn kompromiso, kiu senĉese gvidas nin en ĉiu misio.”

## Masakro grandskale organizita

La BBC raportas [2]: “Pluraj soldatoj, kiuj partoprenis en la sturmo de la israelaj trupoj kontraŭ Gazao rekonas, ke ĝeneraligitaj misuzoj estis faritaj kontraŭ civiluloj pro la permesemaj reguloj laŭ la engaĝiĝo.”

Por ununura operacio “תּרפּוּעַ עֶצְבָּם” (Fandita plumbob) (הקוּצֵי הֶקוּצֵי) (Fandita plumbob), kiu komenciĝis la 18an de januaro 2009 kaj daŭris 22



**Netanyahu**

tagojn, pluvo da raketoj falis sur la sudajn urbojn de Gazao. Se oni nombras 13 mortigitajn personojn ĉe la israela flanko, ĉe la palestina flanko, tio estis vera katastrofo. La Goldstone raporto [3] mencias, ke 1400 palestinanoj, inkluzive 758 civiluloj, estis mortigitaj. Krome, laŭ diversaj raportoj, tio okazigis la detruon de 50 000 hejmoj, 800 industriaj posedaĵoj, 200 lernejoj, 39 moskeoj kaj du preĝejoj...

Tio ne devas igi nin forgesi la masakron de Sabra kaj Ŝatila. Tiun ĵaŭdon, 16an de septembro 1982, ĉirkaŭ 3500 homoj, plejparte infanoj, virinoj kaj maljunuloj, kiuj estis ene de tendaroj ĉirkaŭitaj de armeaj soldatoj kaj sen iu ajn eblo de forkuro, estis vunditaj, seksperfortitaj kaj murditaj. Buĉado! Pli, ni ne devas forgesi la militojn de 2012 kaj 2014... la ĉiutagajn atakojn, la diversajn provokojn, la kidnapojn de infanoj, la senjuĝajn ekzekutojn...

Estas miloj kaj miloj da mortigitaj homoj sen juĝoj aŭ avertoj kaj ĉiutage aldoniĝas novaj mortigoj, novaj masakroj...

Netanyahu asertas, ke li nur defendas sin kontraŭ teroristoj. Sed kion ni vidas? Tie Israelo havas unu el la armeoj la plej forte ekipitan en la mondo. Kontraŭe la palestinaj infanoj havas nur ŝtonojn por defendi sin! Pri tio, kio koncernas la palestinan armeon,

ĝi estas reduktita al manpleno da batalantoj armitaj kun brikabrako.

Okazas monstra genocido, kiun nenio kaj neniu ŝajnas voli haltigi eĉ, se ĝi aperas je la vido kaj sciigo de ĉiuj.

## Cionistoj estas mastroj de la ludo

Respondante al intervjuo, Shulamit Aloni, iama israela ministro, klarigas la cionisman elturnaĵon [4]:

— Ofte kiam ni kritikis israelan politikon ni estas kvalifikitaj kiel antisemitoj. Kiel judo, kion vi diras pri tio?

— Estas kombino, kiun ni ĉiam uzas. Kiam eŭropano kritikis Israelon, tiam ni uzas la vorton “holokaŭsto”. Kiam usonano kritikis Israelon, tiam li estas “antisemito”. Judaj organizoj estas potencaj; ili havas multan monon. Rilatoj inter Israelo kaj la judoj de Usono estas tre fortaj. En tiu lando, judaj entreprenoj estas tre efikaj. Kiel vi scias, ili havas povon! Estas evidenteco! Ili estas lertaj! Ili havas la povon, la monon, la amaskomunikilojn kaj multe pli. Ili identiĝas plene kun Israelo. Por ili, “racio aŭ ne”, estas ilia lando kaj ili ne volas aŭdi kritikojn kontraŭ ĝi. Estas facile kulpigi la homojn, kiuj kritikis iujn agojn de la israela registaro. Sufiĉas etikedi ilin kiel antisemitoj, elvoki la holokaŭston kaj la suferadon de la juda popolo. Tio pravigas ĉion, kion ni faras al palestinanoj.

## Ĉu Usono estas komplico aŭ viktimo?

Pro multaj kialoj, tiel malmulte konvinkaj kiel ĉiuj aliaj, Usono ĉiam apogis kaj ankoraŭ daŭre subtenas Israelon, malgraŭ la neakceptebla konduto, kiujn ili ne povas pretendi ignori. Ili faras tion pagante pezajn subvenciojn. Ekde 1971, Usono pagas ĉiujare almenaŭ 2 miliardojn da dolaroj al Israelo. Tio estas pagata en la formo de varoj kaj diversaj aparataroj, aŭ per simplaj translokigoj de fonduso. Tamen, fortaj suspektoj sugestas, ke ĉi tiu helpo estas ankaŭ uzata por fondi judajn koloniojn en teritorioj ŝtelitaj de palestinanoj.

Ĉi tiu manao ne estas tuj elsekigonta, ĉar Israelo havas multajn defendantojn. Ekzemple, mi citu tiun informon





**Hillary Clinton**

publikigitan en la ĵurnalo "The Guardian" [5]. Por danki la judajn frakciojn, kiuj finance apogas ŝin dum lia marŝado al la konkero de la Blanka Domo, Hillary Clinton tiel sin devontigis al provizado de ili per senkondiĉa helpo: "Sincere, la lastan jaron, Israelo ne donis al Hamaso sufiĉe malmolan lecionon. Kiel kutime, Obama estis tro severa kun nia demokrata aliancano, kaj tro mola kun nia islama-faŝisma malamiko. Kiel prezidanto, mi donos al la juda ŝtato tutan necesan militan helpon, sed ankaŭ diplomatan, ekonomian kaj moralan subtenojn por definitive venki Hamason - kaj se tio signifas: mortigi



**Shulamit Aloni**

200 000 gazaanojn, tiam tiel estu..."

Estas kompreneble, ke sub tiaj kondiĉoj, cionistoj povas kviete daŭrigi la neniigon de palestinanoj, ĝis la lasta kaj eĉ, kiel ne, proprigi al si aliajn najbarajn landojn...

## Kia estas la situacio de Palestinanoj?

1) La palestina aŭtoritato, kontraŭe al tio, kion ĝia nomo sugestas, ne reprezentas la interesojn de la palestina popolo. Lia ĉefa rolo estis ĉiam protekti Israelon de la populara indigno kaj de ĝia rezistado al la kontraŭleĝa okupo de la Okcidenta Cisjordanio kaj Gazao. Ĝi funkcias kiel bufro inter Israelo kaj la palestina loĝantaro. 80% de palestinanoj tute malaprobis la Palestinan Aŭtoritaton pri kiu ili diras, ke la institucioj estas koruptitaj pro la internaj luktoj inter Hamaso kaj Fataho. Je 88%, ili ankaŭ malaprobis la islaman ŝtaton, kiu laŭ ili ne reprezentas veran islamon.

Kiam la soldatoj de la Palestina Aŭtoritato intervenas, la celo estas malsukcesigi atakojn kontraŭ Israelo. Ili konfiskas armilojn kaj malliberigas palestinanojn, kiuj organizas tiujn atakojn. Liaj funkciadaj elspezoj estas konsiderinde altaj, ĉar ili sorbas 36% de la lando totala buĝeto. Sekve al tio, aperis la formulo "Kolonio friponaĵo", kiu cirkulas en la sociaj retoj.

2) Naŭ araboj sidas en la israela parlamento. Ili devas apliki la regulojn de la estrara partio kaj sin teni for de la problemoj, kiuj koncernas Palestinon eĉ, se iuj el iliaj parencoj estas tie forte elprovataj. Ili estas submetitaj al altaj premoj. Malgraŭ ke la israela grupo Gush Shalom kondamnas la "demagogian kampanjon" de Netanyahu, tri arabaj deputitoj, Hanin Zoabi, Jamal Zahalka kaj Bazelo Ghattas estis provizore suspenditaj atendante, ke Netanyahu sukcesu fari aprobita leĝproponon, kiu permesos al li fari laŭ siaj bonvoloj.

3) Jam delonge palestinanoj komprenis, ke ili povas nenion atendi de Izraelo. Neeblas trovi pacon, ĉar Israelo volas elpeli ĉiujn el ili. Pro tio, ĝi lanĉas kontraŭ ili ĉiutagajn ekatakojn, kiuj estas brutalaj, sangaj. Ili faras ĉion eblan por teruri la loĝantaron, ĉefe virinojn kaj infanojn, kiuj estas pli impresblaj. Tio kreas klimaton de malsekureco, kies deklarita celo estas neniigi ĉian socian vivon. Teknikoj por atingi tiun celon bedaŭrinde bone funkcias:

— La padoj ĉiutage uzataj de la palestinanoj, estas tranĉataj per multnombraj kontrolpunktoj ofte ekipitaj de turnokrucoj kaj metalaj kaĝoj. Ĉiufoje ili devas atendi kaj atendi

ankaŭ, antaŭ ol esti priserĉataj. Kelkfoje ili estas devigataj senvestigi por montri, ke ili ne portas armilojn.

— Familiaj patroj estas rutine batitaj kaj humiligitaj je la vido de iliaj infanoj tiel, ke ili perdu sian aŭtoritaton.

— Meznokte la israelaj soldatoj perforte penetras en la domojn, pafas hazarde al la ĉielo kaj faras arestojn. Longposte, kiam la personoj, kiuj estis arestitaj, revenas hejmen, se iun tagon ili revenas, ili estas psikologie kaj fizike detruitaj. Ili estas nur palaj fantomaj estaĵoj! Torturo, pri kio israelanoj fariĝis fakuloj, fine sukcesas mastri ilian reziston.

Doktoro Samah Jabr, palestina kuracisto, tre engaĝita en la defendado de la palestinanoj vivantaj sub israela regado, deklaris al ĵurnalisto de Info-Palestino: "... La okupado ne estas la nura subpremo en la palestina vivo. La manko de demokratio, politika polarizo, korupteco, nepotismo, seksaj malegalecoj kaj distingoj en la sociaj klasoj estas aliaj sociaj malsanoj, kiuj tuŝas la kvaliton de vivo..."

Palestinanoj estas timigitaj! Ili vivas klostrataj en siaj ruinigitaj domoj en la atendo... sed en la atendo de kio? La sekvonta bombo, la sekvonta aresto, elpelo aŭ ekzekuto? Ili sin kaŝas kaj ne kuraĝas paroli pro timo de plua reprezalio kontraŭ ili aŭ ilia familio... Ĉiu nombras siajn mortintojn. Sed la plej junaj renkontiĝas, diskutas kaj ne plu akceptas vidi la policianojn kaj setlantojn sisteme ilin persekuti sur stratoj kaj efektiviĝi senjuĝajn ekzekutojn. Ili rifuzas esti ĉasitaj kiel kunikloj tiam, kiam ili ne havas armilojn por sin defendi kaj estas nur vojirantoj. Ribelado minacas! Morgaŭ estos terura...

La tuta mondo estas surda al la voko pri helpo de palestinanoj. Eĉ la larmoj kaj krioj de infanoj, kiuj estas murditaj restas neaŭdite.

ROGER CONDON

[1] <https://rtsf.wordpress.com/2009/07/15/breaking-silence-on-israeli-war-crimes/>

[2] [http://news.bbc.co.uk/2/hi/middle\\_east/8149464.stm](http://news.bbc.co.uk/2/hi/middle_east/8149464.stm)

[3] [https://fr.wikipedia.org/wiki/Rapport\\_Goldstone](https://fr.wikipedia.org/wiki/Rapport_Goldstone)

[4] <https://www.facebook.com/MohammadOfficial/videos/1119396758078592/>

[5] <http://www.themideastbeast.com/clinton-to-donor-in-next-war-i-will-let-israel-kill-200000-not-just-2000-gazans/>

# De la mizero de la Unuiĝintaj Nacioj

## Resumo

1. La UN estis fondita post la dua mondmilito.

2. Celoj estis, ke tragedio kiel la dua mondmilito kaj la amasmurdo de homoj neniam plu okazu.

3. La ŝtatoj venkintaj la duan mondmiliton kaj la naziisman faŝismon, Britio, Ĉinio, Francio, Rusio kaj Usono, dekomence ludis gravan rolon en la UN. Ĝis hodiaŭ ili havas (sen la historio neĝustigeblajn) fortajn povojn, inkluzive vetorajtojn pri rezolucioj.

4. Dum la finado de la koloniiga erao aliradis al la UN multaj ŝtatoj sen demokrataj strukturoj. Nuntempe la nombro de plenrajtaj membroŝtatoj en UN estas 193.

5. Post debatoj, kies temojn ĉiu ŝtato membra povas proponi (ekzemple publikigi rezolucion kontraŭ ŝtato X), okazas voĉdonado. Ĉu io estas konsiderinda kiel ofendo al la homrajtoj kaj ĉu ĝin finfine oni konsideras tiel estas decido de plimulto.

6. Ankoraŭ regas la kredo, eĉ inter maldekstruloj, ke la UN estas pozitiva internacia organizo, kvankam la samaj personoj neniam defendus la unuopajn ŝtatojn membrajn de la UN. Kiel teksto interkonsentita per reaciaj ŝtatoj (ekzistas kvazaŭ neniu escepto) povas enteni ion pozitivan, kion ankaŭ mi kiel maldekstrulo povus akcepti, superas mian cerbopovon.

7. Ekzistas kritika organizo neregistara “UN-viglado” (“UN Watch” — la prominenta parolanto estas Hillel Neuer), kiu precipe kontraŭbatalas la nekompreneblajn decidojn kaj unuflankecajn debatojn pri homaj rajtoj, ekzemple post propono fare de Saud-Arabio krei rezolucion kontraŭ Israelo.

DOMINIK SCHRAMM

Inter la grandaj eraroj estas konsideri la UN-n io tute bona, racia, superpartia kaj certagrade vidi en ĝi la

mondan gardanton de la homaj rajtoj. Certe, la Unuiĝintaj Nacioj estis origine, kiel Lotta Grinstein [grinŝtajn] skribis en tre leginda artikolo en la ĵurnalo *Phase 2* (Fazo 2, germanlingva maldekstra trimonata ĵurnalo), “kontraŭfaŝisma militalianco”, fondita por “protekti venontajn generaciojn de la skurĝo de milito, kiu jam dufoje dum niaj vivtempoj alportis neelparoleblan suferon super la homaron” — tiel legeblas en la antaŭparolo de la UN-ĉarto. Tamen jam dum la fazo de ĝia fondo malkovriĝis, kiel Grinstein plue analizis, “la nesuperigebla antagonismo inter la idealisma ideo de universalaj homrajtoj kaj la malmola realeco de naciŝtata suvereneco, kiu per ĉiam akompanos la UN”.

Dum la plimulto de la fondomembroj almenaŭ estis burĝaj demokratioj, la proporcioj de la fortoj ŝanĝiĝis en la evoluo de la senkoloniigado: “Multego da nove fonditaj aŭ sendependiĝintaj ŝtatoj svarmis al la UN en la 60-aj kaj 70-aj jaroj, inter kiuj multaj tre frue solidiĝis kiel despotaj reĝimoj kaj fifamigis la fondoidealojn de la UN kiel novkoloniismon, por tiel kaŝi la ofendadon de la homrajtoj de siaj civitanoj.” Samtempe la baza strukturo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ilia labormaniero (*modus operandi*) restis senŝanĝaj. Daŭre validis: unu ŝtato — unu voĉo. “La kvalito de la internacia politiko pri homrajtoj fariĝas konsekvence demando de plimulto”, konstatas Lotta Grinstein en *Jungle World* (germanlingva semajna ĵurnalo), kaj tiu plimulto estas nun “en kvazaŭ ĉiuj UN-konsilioj, escepte en la Konsilio de Sekureco, en la flanko de la arabaj kaj la islamaj landoj”.

Tiuj ĉi ŝtatoj disponas ekzemple en la homrajta konsilio de la UN pri ĉirkaŭ triono de la voĉoj kaj estas kune kun multaj “senblokaj” landoj — samkiel foje kaj refoje kun Rusio kaj Ĉinio — en la plimulto. Ene de tiu ĉi plimulto oni subtenas sin reciproke, voĉdone aligas unu la alian al diversaj



konsilioj kaj zorgas pri tio, ke la ofendado de homrajtoj en la propra lando ne fariĝas paroltemo. Samtempe la aŭtokratioj, despotioj kaj diktatorioj en la UN rebatas la okcidentan kritikon de iliaj ofendoj kontraŭ la homrajtoj foje-refoje per laŭtaj atakoj kontraŭ Israelo — por tiel simuli propran engaĝiĝon pri homrajtaj demandoj. Tiel kaj ne alie eksplikiĝas la grandega nombro da rezolucioj, en kiuj la juda ŝtato estas kondamnita.

Ankaŭ la absurda decido, prenita antaŭ kelkaj tagoj (t.e. kelkaj tagoj antaŭ la publikigo de tiu ĉi artikolo je la 25-a de marto de 2015), meti Israelon kiel ununuran landon de la mondo al la pilorio pro la difektado de inaj rajtoj, rezultas de tiu konstitucio. La samo validas pri tuta aro da aliaj decidoj, raportoj kaj aranĝoj, el kiuj ĉi tie nur kelkaj de la nuntempo kaj de la proksima pasinteco estu ekzemple menciataj:

– La Ĝenerala Kunveno de la UN akceptis dum sia kunsido komence de tiu ĉi jaro ne malpli ol 20 rezolucioj, en kiuj oni kritikis Israelon — kaj nur tri kontraŭ aliaj landoj (nome Sirio, Norda Koreio kaj Irano).

– Triono de ĉiuj rezolucioj kaj decidoj, kiujn akceptis la konsilio pri homrajtoj de la UN dum sia tuta ekzisto, celas la judan ŝtaton.

– En la nunaj, laŭvicaj kunsidoj de la konsilio pri homrajtoj la tagordo mencias sub punkto 4 la okupo pri ofendoj tutmondaj kontraŭ la homrajtoj. Tamen ekzistas escepto: La « homrajta situacio en Palestino kaj





Hillel Neuer

aliaj arabaj regionoj » havas propran tagordopunkton. Sep raportoj kaj kvar rezolucioj celos eksplicite Israelon. La nombro de raportoj kaj rezolucioj, kiuj rilatas al ekzemple Pakistano, Kataro, Saud-Arabio aŭ Sudano, estos nula.

– Post malmulte da tempo la Konsilio pri Homrajtoj krome prezentos sian finan raporton pri la milito inter Ĥamaso kaj Israelo dum la pasinta jaro. Ke ĝi iĝos denove, kiel jam la raporto de Goldstone antaŭ ses jaroj, filipiko kontraŭ Israelo, estas tre probable. Hillel Neuer, la neregistara

organizo kritika pri UN, “UN Watch” (“UN-viglado”), montris per la ekzemplo de la Goldstone-raporto, kiel tiaj raportoj estiĝas, kiun personaron la UN kunvokas al tio, kian rolon ludas en tio la Alta Komisaro por Homrajtoj.

– La UN subtenas du helpo-konsiliojn por rifuĝintoj: la UNHCR kaj la UNRWA. Ĉi-lastata okupiĝas nur pri la Palestinoj, la antaŭa pri ĉiuj aliaj rifuĝintoj de la mondo. Kiel la “helpo” de la UNRWA konkrete aspektas kaj kiurilate tiu ĉi institucio subtenas, kun amikeca helpo el Eŭropo, la palestinan terorismon, tion jam detale pritraktis la ĵurnalisto Stefan Frank.

Kiam do Israelo denove estas kondamnita per UN-konsilio, tio diras nenion ĝis malmulte pri la juda ŝtato, sed anstataŭe sufiĉe multe pri la mizera nuntempo de la Unuiĝintaj Nacioj. Ties elektemaj kaj unuflankaj rezolucioj subfosadas “la bazan principon, laŭ kiuj homrajtaj normoj estas universalaj, kaj plu drivigas la partiojn unu for de alia”, kiel skribis Hillel Neuer en novembro de 2013. “Estas la UN, kiu devus pardonpeti pro tio, ke ĝi uzadas Israelon kiel propekan kapron kaj ke ĝi demonigas kaj



Lizas Welt

senlegitimigas la judan ŝtaton kiel metakrimulon, al kiu oni devas atribui ĉiujn malbonojn de la mondo”, tiel daŭrigas Neuer. Antaŭ ĉio tamen ĝi devus “pardonpeti pro ignorado de la krioj de milionoj da veraj viktimoj de homrajtaj ofendoj tra la tuta mondo — kaj pro mokegi ilin”.

LIZAS WELT

*Traduko fare de Dominik Schramm el la germana originalo “Vom Elend der Vereinten Nationen”.*

## La malbonvola spirito Putin

La malica spirito Putin. Jes ja, tiel li estas priskribata en la nederlandaj amaskomunikiloj; vere tro idiotas por ĝuste esprimi, kiel oni pensas pri tiu viro! Dum pli ol duono de la landanoj estas senscia pri Putin kaj Rusio, la mediatoj malam-kampanjas kontraŭ ili. Surbaze de onidiroj, sed ne faktoj. Kiel povis tiel evolui en Nederlando tiu malamigado? La kraŝo de MH17 (super Ukrainio), kies kulpon oni perforte ŝovas al Rusio. Ne mallaŭdindas Ukrainio, ho ne! Tiuj aliĝu al EU. Kiucele do?

Por bufri kontraŭ Rusio, laŭ Usono kaj EU minacanta la mondon. Jen mia novaĵo por vi: la minacon por la monda paco formas Usono kaj EU. Ŝajnigante liberecon kaj demokration tiuj militadis kaj militadas: Vjetnamio, Kamboĝo, Koreio, Kubo, la unua Gola milito, Salvadoro, Kongo, Malio, Jemeno, Kolombio, Libano, eks-Jugoslavio, Afganio, Ukrainio, Libio, Irako, Sirio: sendube mi forgesis kelkajn. Tiuj militoj ne estas defendaj, sed agresaj por malstabiligi landojn. Sub la masko de demokratio kaj

libereco ili volas kolonii la landojn. De antaŭ jarcentoj tiel agas pluraj (nunaj) EU-landoj kaj Usono.

Kaj kion pri Rusio? Ĉu ĝi komencis militon kontraŭ EU aŭ atakon al Usono? Ne, rusoj respektas la internacian juron kaj helpas aliancinojn, ekzemple Sirion kaj la denaske rusajn loĝantojn de Ukrainio, kiuj sentas sin minacataj de la revolucioj reĝisorataj de Usono kaj EU. Certe, pasintec ankaŭ Rusio komencis militojn, sed de post la Dua Mondmilito frontuloj en la detruado de Mez-Oriento kaj Afriko estas Usono kune kun EU. Por ekzemplo memoru Sudanon en Afriko. Kial do demonigi Putin?

Prefere ni gratu nian kapon kaj pripensu, kiel ni ordinaraj eŭropaj civitanoj estas concernataj en ĉi tiuj teruraj militoj, kiuj senvivigis jam milojn, se ne milionojn da homoj. (Kaj dolore alfluigis hordojn da senhejmigitaj.) Nia imposta mono nerekte iras al la defenda sistemo, kiu laŭvole bombadas en Sirio, Irako, Afganio por nuligi IŜ. Nu, ĝi ne vere sukcesas. Infanoj, virinoj, simplaj civiluloj mortas

ankaŭ pro nederlandaj bomboj!

Kaj por ekscesigo FBI kaj CIA (la usonaj sekretaj servoj) esploras, ĉu ne estas rus-amikaj kaj ĉu ne kaŝiĝas spionoj en nederlandaj organizaĵoj kiel *Geen Peil* (“Ne normnivele”), pagataj de Rusio. Kiel oni tion karakterizas do? Ĝuste: minactimigo (teroro)!

SONJA VAN DEN ENDE

METRO 26-a de januaro 2016

[https://issuu.com/metro\\_holland/docs/20160126\\_nl\\_amsterdam](https://issuu.com/metro_holland/docs/20160126_nl_amsterdam)

*Parentezaj aldonoj de la tradukanto*

*Rob Moerbeek*



Sonja van den Ende

# Kubo: granda sukceso kaj malgranda malsukceso



**En tiu momento, kiam oni ne scias, ĉu oni ĝoju, ĉu timu pri Kubo, post la laŭdira “fino” de la blokado fare de Usono: jen, malkutime, artikolo de simpatianto de la komunisma Kubo, tamen artikolo, kiu ne parolas pri ties atingoj, sed pri ties problemoj.**

Paroli pri Kubo estas rezigni je ia debaza neegaleco: ke Kubo devas ne nur sin defendi, sed ankaŭ sin pravigi senĉese, sentigas ĝin kiel fremdaĵon, kiel ion artifice nenaturan meze de la natura naturo, ia anomalio stranga aŭ krima, kaj per tio mem la modelo, kiu ĝin atakas, kune kun ĝiaj malleĝaj portortagoj, aspektas ĉiam kiel io natura, prava, legitima, kaj kies potenco mem donas al ĝi la rajton postuli de Kubo sinpravigojn.

Mi ne defendos Kubon ĉi-vespere. Mi ne atentigos vin pri tiuj aspektoj, en kiuj ĝi montras sin evidente supera: ĝia kapablo, kvankam kun malmultaj rimedoj, protekti efike sian loĝantaron kontraŭ katastrofoj, (male al sia povriĉa najbaro) ĝia eksterordinara sangarda sistemo, laŭdita de la Monda Organizo pri Sano, kiu provizas ĝin per vivstatistikoj kompareblaj al tiuj de riĉaj landoj, kaj faras ĝin eksportanto de medicinaj helpantoj, ĝia publika instrusistemo, modela por la ceteraj landoj de Latinameriko, ĝiaj sukcesoj en la terenoj de scienca esploro aŭ sporto. Ne, kvankam agnoskitaj de internaciaj organoj, kaj ripetitaj ĝissate de la amikoj de Kubo, ili ne pli sukcesos eniri en la mensojn de la neaŭdemuloj, kaj ne pli sufiĉas por validigi la revolucion, ol la sekretaj karceroj kaj la fosfor-bomboj sufiĉas por senvalidigi la supozitan demokration de Usono. La vero de Kubo ĉiam estos nura retoriko kaj propagando, dum la vero de Usono estos nur malfeliĉa akcidento, flanka misfunkciigo negra, ekstertema.

Mi parolos malbone pri Kubo. Mi parolos malbone unuavice, ĉar paroli bone utilas al nenio. Mi parolos malbone pri Kubo cetere, ĉar tiuj, kiuj

amikas al la revolucio, ne devas eviti la malhelojn, kiuj ene de la insulo mem estas diskutataj kaj denuncitaj malferme. Sed mi parolos malbone pri Kubo, egale kaj precipe kun la celo, ke tra la aĵoj, kiuj ruliĝas malbone, ni povu kompreni la logikon, kiun ni ne povas rekoni en la aĵoj, kiuj ruliĝas bone. Anstataŭ atenti la aspektojn, pri kiuj la kuba modelo estas evidente supera, mi enfokusigos sur kelkaj problemoj, kiujn ĝi kundividigas kun la kapitalisma modelo, por provi konstati, ĉu la samaj problemoj obeas al samaj kaŭzoj, aŭ ĉu ili evidentiĝas ŝablonojn kaj strukturojn malsamajn.

Mi limigos min je tri problemoj, kiujn Kubo dividigas kun Hispanio (aŭ ajna kapitalisma lando).

Unue mi parolos pri problemoj nun maltrankviliga en la kuba socio, kiun ni nomas la “malprofesiigo de laboro”. Oftas pli kaj pli, ke profesiuloj alte kapabligitaj, instruistoj, esploristoj, kuracistoj, faras laboron tre malsuperan je sia kapablo, kun la kompreneblaj frustrigoj persona kaj malprofita socia. Meze de la ĉiutagaj malfacilaĵoj en la insulo, kaj tiu biblia malbeno, kiun turismo envenigis en ĝin, fakistoj kaj universitatoj rezignas pri la fako, kiun ili estis libere elektintaj, por perlabori pli da mono, plenumante rutinan senkompetentecan laboron. Dum unuafoje post 1959, la kuba registaro frontas mankon je instruistoj (des pli, ĉar ties modelo postulas du instruistojn en ĉiu unuopa klaso). Ja oni povas konstati, ke la taksioferoj kaj hotelĉambrieroj en Kubo estas la plej kleraj de l'mondo, sed ne estas nur, ĉar la taksioferoj kaj hotelĉambrieroj (kaj tiom bone kamparanoj) multe legas dum sia libera tempo, sed ankaŭ ĉar la inĝenieroj kaj historiistoj, farigante sin valizportistoj en la hoteloj, enspezas pli da mono ol per sia teoria laboro. Ni povas esperi, ke per la maldolarigo de la ekonomio, pliigo de la minimuma salajro kaj plibonfartigo de la kuba ekonomio, ni en la estonto povos eviti tiun riĉfonto-elverŝon, sed nun tiel estas la situacio.

Kiel ni ĉiuj scias, tian fenomenon ni renkontas same en Hispanio. Estas tio eĉ pli endemia en nia lando, kie pli kaj pli da junuloj fine faras laboron malsaman ol tiun, por kiu ili kapabliĝis. Ĉie renkonteblas junuloj, kiuj eĉ eluniversitatiĝintaj kiel unuarangaj inter sia studjaranoj, laboras kiel telefon-servantoj aŭ kelneroj en Burger King-manĝejo. Tiuj junuloj ne elektis perlabori pli da mono, sed entute ne povas fari la laboron, al kiu ili sin pretigis kaj al kiu ili inklinitaj, kaj al ili trudatas konsenti, se ili ne volas malsatmorti, deĵori en laboro rutina, fremdiga, kaj en kiu cetere oni pasigas multajn horojn kaj gajnas malmultan monon.

Do sub du problemoj samaj, en Kubo kaj en Hispanio, ni povas malkovri du logikojn malsamajn. Foje, reveninte de vojaĝo al Kubo, mi renkontiĝis kun hispana amiko, biologo, kaj li tristigis aŭdinte, ke en Kubo valizportisto en hotelo perlaboras pli ol sciencisto. Tiu viro estis partopreninta en protestado de 400 hispanaj esploristoj, kiuj denunciis la politikon pri scienca esploro en sia lando, kaj ĝenerale en Eŭropa Unio, kie malsekuraj kontraktoj, kapricaj stipendioj kaj dependeco de la privata sektoro igas, ke post kelkaj jaroj multaj elinter la junaj esploristoj finfine elĵetiĝas el la sciencaj cirkvitoj kaj devas fariĝi telefon-servantoj aŭ kelneroj en Burger King. Mia amiko, kiu kompatis al la kubanoj, ne konsciigis, ke lia sorto pli malbonas ol tiu de liaj insulaj kolegoj. En Kubo sciencistoj ne petas laboron, ili povas fari la laboron, kiun ili elektis, kongruan al siaj spiritaj ambicioj, kaj nur se ili ne eltenas, se ili volas plibonigi sian personan situacion per enspezado de pli da mono, libere ili forlasas sian terenon por plenumi deĵoron pli brutigan, sed pli bone pagitan.

La sorto de hispana sciencisto estas precize mala: ne estas efektive permesite al li servi al sia animo, al la homaro, al sia lando, farante la laboron, por kiu li pretigis sin, kaj



krome estas trudite al li konsenti je tre malalta salajro en laborposteno brutiga. En Kubo la problemo konsistas en ekonomiaj rimedoj; sendube estus pli bone, se ties sciencistoj, tiom bone kiel la cetero de ties civitanoj, atingus pli altan nivelon de materiala bonstato, sed en Kubo ne estas trudite al iu ajn labori kiel valizportisto, se li kapabliĝis kiel neŭrobiologo.

Sed pli terura ol tio estas la konstato, ke tiu malsameco je modelo akompanatas de la kongrua malsameco mensa. Ial strangas, ke mia amiko hispana biologo, kiu protestis, ĉar li ne povis sin dediĉi al biologio, anstataŭ envii sian kuban kolegon, ĉar li povas fari esplorojn, kompatas lin, ĉar li perlaboras malpli ol valizportanto de hotelo, kvazaŭ oni devas fariĝi biologo por lukri pli da mono. Jen al kio reduktiĝas sub la sepsiga influo de kapitalismo la modelo pri universala kaj senprofitema scienco, kiun alvokas nia kultura tradicio; la junaj hispanoj strebas fariĝi biologoj kaj ne valizportistoj pro la sama motivo, pro kiu kubaj biologoj fariĝas valizportistoj: por havi pli da mono. Kun tia mensa horizonto kaj tia socia premo, ne mirigas, ke kelkaj por eviti telefonon kaj Burger King-on konsentas pri instigoj de la nafto-firmaoj por falsi informojn pri klimatsanĝiĝo aŭ de la farmaciofirmaoj por kaŝi danĝerojn de iuj farmaciaĵoj.

Dua problemo nun: la loĝejoj. Fakte, Kubo spertas seriozan mankon je loĝejoj. Veras, ke male al tio, kio okazas en Hispanio, neniu dormas en la strato, sed ofte okazas, ke junuloj ne povas forlasi la domon de siaj gepatroj, kaj ke al ĝis tri generacioj trudiĝas dividi spacon, kiu tial fariĝas ĉiam pli mallarĝa kaj sufoka, kun la rezulta fuŝiĝo de la kunvivo kaj la psikologia bonsento. La kialo de tio estas tiom terura kiom simpla: mankas la domoj, kaj mankas la rimedoj por ilin konstrui.

Sed ĉu tiu problemo ne estas kutima ankaŭ en Hispanio? Pli kaj pli malfrue junuloj elflugas el la hejmo patrina, pli kaj pli ofte renkontiĝas en unu sama loĝejo tri generacioj – genepoj, gepatroj, gefiloj – dividante saman spacon en etoso interlukta kaj intermaltrankviliga. Sed ĉi-okaze, se la simptomoj similas, la kaŭzo de l' problemo ŝajnas pli malfacila por kompreni. En Kubo mankas la domoj kaj la mono por konstrui pli da; sed en

Hispanio troas la domoj kaj oni ne ĉesas plukonstrui. La stoko de loĝejoj en Hispanio kreskis je 21% depost 1991, dum la loĝantaro kreskis je nur 5%. Nia lando havas la plej altan kvoton de loĝejoj senokupaj en la tuta Eŭropa Unio: En la nura urbaro de Madrido troviĝas 300.000 domoj tute vakaj, kaj pliaj 300.000 uzatas nur kiel dua loĝejo. La problemo hispana estas en la spekulado, kiu faras el la domoj ne uzovaloraĵojn nefordoneblajn, provizitajn per kvar muroj kaj kelke da fenestroj, sed lokumojn por la mono, akcioj, nuraj valorpaperoj.

Ni iros nun al tria problemo, escepte tikla: korupto. Kiel Fidel Kastro mem denunciis en eksterordinara parolado, ioma korupto finfine enŝoviĝis en la teksaĵon de la revolucio. Unuflanke, ekzistas tio, kion pli precize ni povus nomi “malaltintensa korupto”, kaj kio rilatas kun tio, kion la kubanoj nomas “elturniĝi”, t.e. kun la neceso iom remburiri la familian buĝeton ekster la establitaĵoj. Multiĝas ekzemploj de tiaj praktikoj: la ŝtandardgito, kiu uzas sian ŝtatan veturilon ekster la deĵorhoroj kiel taksion; la cigaristo, kiu fordirektas iom da tabako el la fabriko; la emerito, kiu ludonas loĝejon al eksterlandano. Kaj estas ankaŭ, veinde, korupto mezintensa, tiu, kiun precize denunciis Fidel Kastro, kaj kiu rilatas kun la biblia malbeno de turismo, kaj la ekonomiaj kontraŭaĵoj, kiujn tiu envenigis en la insulon. Se ni difinos korupton kiel “uzadon de publikaj povoj kaj rimedoj por servo de privataj interesoj”, mi opinias, ke ni povas kvalifiki korupto kaj la unuan kaj la duan, kaj devas konfesi, ke ankaŭ en Kubo ekzistas korupto.

Sed se ni prenas tiun difinon de korupto (“uzi publikajn povojn kaj rimedojn por servo de privataj interesoj”), tiam ne eblas ĝuste diri, ke ekzistas korupto ankaŭ en kapitalismo, sed ke korupto kaj kapitalismo estas sama afero, kaj ke korupto estas la konduto normala, kutima, senĉesa de la reĝimoj kapitalismaj. Kapitalismo estas korupto, kaj korupto tiom altintensa, ke ties efikoj kalkuliĝas ne per mono, sed per mortoj. Escepte Kubon kaj Venezuelon, ĉiuj registaroj de l' mondo konsentis submeti sian politikan memstaron kaj moralan dignecon al ordonoj de privataj interesoj kaj solidigis tiun submetiĝon per subskribo de internaciaj interkonsentoj (TLK, ALKA, ĜAKS)

aŭ obeado al internaciaj organoj (MOK, IMF, Monda Banko), kiuj submetas ĉiajn povojn kaj riĉojn de publikaj rimedoj (akvo, energio, semoj, mineraloj, nafto) al la deziroj de firmaaj interesoj. Kapitalismo estas korupta sistemo de produktado kaj konsumo, kaj tiu korupto sterniĝas kiel oleomakulo ĉiunivelen, de la kunsidoj en Davos ĝis tiuj en kvartaloj.

Korupto en Kubo seriozas, sed konsistas ĉiamaniere el esceptoj individuaj je la regulo. La danĝero kuŝas en tio, ke la sumo de tiuj esceptoj, la ĝeneraligo de tiuj esceptoj, kiuj neniamaniere malvalidigos la regulon, povas igi ties efektivigon nerealigebla. Tial Fidel Castro tre pravis, rigardante ĝin kiel temon gravan. Korupto en Kubo, ĉiaokaze, faras nenion alian ol malutili al la revolucio, kaj difektas ties nedubeblajn sukcesojn. Korupto sub kapitalismo malsame estas laŭvorte mortiga. Ekzemploj: kio normalas estas, ke Merck retiris la kontraŭbruluman medikamenton Viexx, sciiginte pri ties rezultoj, nur post kiam ĝi kaŭzis 27.000 mortojn; normalas, kiam la firmao Bayer denunciis la registaron de Sudafriko, ĉar tiu provis kuraci la centmilajn infektitojn de aidsos enlandajn; normalas, se kiam la transnacia entrepreno SMAK maldungas 22.000 laboristojn, tuj ties akcioj iras alten; kio normalas krone kaj krome estas, ke mortis tri milionoj da kongolandanoj en kvin jaroj, por ke dek okcidentaj entreprenoj, denunciataj de UN, povu helpe de la raraj metaloj ekstraktitaj plu vendi tablokomputilojn kaj poŝtelefonojn. Tial, se ni povas nomi “malaltintensa korupto” tion, kion la kubanoj nomas “elturniĝi”, do ni povas envere tiom bone tianome difini tion, kion en niaj landoj ni nomas “aĉeti”. Kaj direblas, ke ni ĉiuj okcidentaj konsumantoj praktikas korupton ĉiufoje, kiam ni iras en ian superbazon.

La korupto en Kubo, mi diris, seriozas, sed homecas, kaj montras la homecon de modelo, kiu povas esti influita al bono tiom kiom al malbono, de la individuaj decidoj, kaj pro tio mem malfortikas, ĉar pro tio mem estas envere modelo politika. La kuba socio estas tiom homa, por la bono kiom por la malbono, ke ties pluvivo dependas de la homoj, kiuj konsistigas ĝin, kaj de tio, kion ili faras al ties institucioj kaj leĝoj, kaj se solidareco kaj rezisto povas ĝin savi, korupto kaj

indiferento povas ĝin detrui. Kontraŭe, kapitalismo estas tiom ece korupta, nepersona kaj nehoma, ke nenia individua malmalico povas korekti ĝin. Veras, ke kapitalismo kreas en si kelkajn, pardonu la esprimon, elstarajn fekulojn, kaj ke tiuj, kiuj batalas kontraŭ ilin, bezonas brute solidan moralan kirason, sed kapitalismo ne resumigās en la personoj de siaj elstaraj fekuloj, nek la etendiĝo de la malmalico povas detrui ties logikon. Revolucio bezonas satantajn homojn; la merkaton subtenas malsatantaj homoj; kaj malsato trudas sian feran leĝon al ĉiuj ties vasaloj egale.

Mi finis. Kredas mi, ke per tiuj ekzemploj ni povas ekvidi ĝis kia grado en terenoj, kie la kuba socio kaj la kapitalisma socio dividas samajn problemojn, la malsamecoj ekvidiĝas tuj, ne nur parolante pri homaj malutiloj, morala fuŝiĝo kaj detruo de rimedoriĉoj, sed ankaŭ – kaj fontas el tio la aliaj malsamecoj – pri modeloj.

La diferenco inter la kuba modelo kaj la kapitalista estas tiu, kiu ekzistas inter malgranda fiasko kaj granda sukceso: La kuba revolucio volas solvi la vivproblemojn de siaj civitanoj, kaj ne povas, pro rimedomanko, aliflanke kapitalismo volas, ke la junuloj ne havu loĝejojn kaj ke samtempe konstruatu pli kaj pli da domoj, kaj pri tio sukcesas; ĝi deziras, ke siaj junaj universitatoj laboru en Telefónica aŭ en Burger King por mizera salajro, kaj pri tio sukcesas; volas, ke la afrikanoj malsatmortu, kaj pri tio sukcesas; deziras, ke la senegalaninoj prostituu sin, kaj pri tio sukcesas. Jes ja kapitalismo, male al la kuba revolucio, sukcesis, kaj plene sukcesis.

Sed inter la malgranda malsukceso, korektebla, de la kuba revolucio, kaj la granda sukceso, nekorektebla, de kapitalismo, politiko, moralo, poezio, ĉio, kion oni resumas en la vorto “civilizo” ne maltrafas montri al ni, kiun flankon indas elekti.

SANTIAGO ALBA RICO

*Esperantigis Roland Platteau*

*Januaro 2006*



**Santiago Alba Rico**

## ELAM: Sano el Kubo por la Mondo

La Latinamerika Lernejo Pri Medicino, ELAM, laŭ ĝiaj komencliteroj en la hispana, estas projekto apartenanta al la Plena Programo pri Sano, per kiu Kubo solidarece donas medicinan kunlaboradon al diversaj landoj. Tiu iniciato iĝas montro de tio, kion malriĉa lando ekonomie, sed riĉa en humana kapitalo, povas fari se ekzistas la necesa politika volo por helpi aliajn popolojn. La iniciato devenas el la pensmaniero kaj la politika volo de la kuba eksprezidanto Fidel Castro, iniciatinto de tiu projekto. La institucio senpage edukas modestajn gejunulojn el diversaj partoj de la mondo pri medicinaj sciencoj. La studentoj, post sesjara periodo de studado, revenas al siaj komunumoj por kontribui al la subteno de ties sansistemoj.

La ideo konstrui la Latinamerikan Lernejon pri Medicino aperis je la fino de la 20-a jarcento, kiam la landoj de la regiono spertis grandan detruon pro la atako de la uraganoj George kaj Mitch, fenomenoj, kiuj okazigis en 1998 ĉirkaŭ dek mil mortintojn kaj milionojn da aliaj viktimoj, krom malutilon al la ekonomioj de la centramerikaj landoj. Antaŭ tiu situacio, tuj sendiĝis brigadoj de kubaj kuracistoj por helpi la trafitan loĝantaron de eĉ la plej izolitaj lokoj kaj, la 21-an de novembro 1998, eksprezidanto Fidel Castro lanĉis la ideon konstrui en Kubo lernejon por formi, senpage, kiel kuracistojn, junulojn devenintajn el centramerikaj kaj karibaj nacioj detruitaj de tiuj uraganoj, kiuj lasis altan nombron da viktimoj kaj nekalkuleblajn materiajn perdojn.

Apenaŭ tri monatojn post la eksciigo de la solidara iniciato de la kuba registaro, la instalaĵoj de iama naŭtika akademio fariĝis la nuna Latinamerika Lernejo pri Medicino. La 27-an de februaro 1999, la unuaj studentoj el Nikaragvo alvenis en la lernejon.

Ĉefkomandanto Fidel Castro, iama ŝtatestro de la kuba registaro, inaŭguris la lernejon. Ĉeestis la inaŭguron la partoprenintoj de la 9-a Iberamerika Pint-kunveno de Ŝtatestroj kaj Registaroj okazinta en Havano, la 15-an de novembro de la sama jaro. La lernejo komencis la unuan kurson, kaj inaŭguriĝis, kiam 1933 gejunuloj el 18 landoj eniris en ĝiajn klasoĉambrojn.

La ideo konstrui tiun ĉi lernejon rilatiĝas kun la internaciisma sanzorga emo de la Kuba Revolucio, plenumita per la unua sendo de kuracistoj al Alĝerio en 1963. Tiu ideo montras ankaŭ pozitivan sintenon rilate al la mizero, la malsanaro de la Tria Mondo kaj al la senĉesa serĉo de alternativoj, kiuj estas konstantaj agadoj de nia Revolucio.

La rimarkinda celo de tiu ĉi institucio estas formi Bazajn Ĝeneralajn Kuracistojn, kies ĉefa agado enfokusigas la bazan san-prizorgadon kiel la ĉefan profesion agadcentron pro iliaj scienca, humana, etika kaj solidara preparadoj, kapablaj agi en ties medioj por kontentigi la regionajn bezonojn kaj kontribui al konstanta homevoluigo.

Por sukcese plenumi tiun mision oni disponas je vasta sperto pri la formado de kubaj kaj eksterlandaj kuracistoj, pro la konstanta evoluo kaj la perfektigo, kiujn subtenis la sansistemo kaj la medicinaj universitatoj de la lando dum la lastaj kvar jardekoj. Oni ankaŭ disponas je kunveno de instruistoj, formata de la plej elstaraj docentoj kaj esploristoj en ĉiu regiono, spertaj pri la plej modernaj metodologioj kaj scienc-pedagogiaj teknikoj en la proceso pri instruado kaj lernado.

Enirante al la Latinamerika Lernejo pri Medicino, la nehispanparolantaj studentoj devas aliĝi al duonjara intensa kurso pri la hispana lingvo. Ĉiu lernanto ricevas niveligan kurseton pri medicino por ke ili povu, pli bone trejnitaj, aliĝi al ciklo de studoj pri Bazaj Sciencoj, kiu estas instruata dum la du unuaj jaroj de la kariero en ELAM. Fininte tiun ciklon, la estontaj kuracistoj aliĝas al kromaj fakultatoj pri medicino de la lando por daŭrigi siajn klinikajn studadojn, kiuj finiĝas post ses studjaroj. Depost praktika trejnado la studentoj submetiĝas al ŝtata teoria-praktika ekzameno. La sukcesintoj ricevas la titolon Doktoro pri Medicino.

La 20-an de aŭgusto 2005 okazis la unua diplomigo de 1610 kuracistoj. Oni nur postulas de la junuloj (de 17 jaraĝaj ĝis 25) ke ili revenu al siaj modestaj loĝlokoj por labori tie kaj apliki tion, kion ili lernis en Kubo.

AMPARADO CISNERO ROVIRA





# Kolombio: Liberigu tuj la profesoron kaj sindikatanon Miguel Ángel Beltrán

Doktoro Ángel Beltrán, kolombia universitatano kaj membro de la sindikato de supera instruado APSU, estis arestita pro akuzoj de ribelo en julio 2015 kaj maljuste kondamnita al enkarcerigo je 8 jaroj en la alta sekureca malliberejo en Bogoto. Doktoro Beltrán antaŭnelonge komencis malsatstrikon postulante justan ekzamenon de sia afero, kaj plibonigon de la enkarcerigaj kondiĉoj por ĉiuj malliberuloj ĝenerale. Doktoro Beltrán estas vigla kritikanto de la kolombia reĝimo kaj dediĉis grandan parton el siaj esploroj al la konfliktoj kaj tumultoj en sia lando. Kolombio spertas la plej altan procenton da perforto kontraŭ la instruistoj kaj sindikatanoj en la mondo.

Doktoro Beltrán estis arestita en majo 2009 pro akuzoj de ribelo kaj komploto. Spite senkulpigon en 2011, li estis maldungita el la Nacia

Universitato de Kolombio. La Internacio de Edukado (IE) petas de vi, ke vi postulu de la registaraj kaj juĝaj aŭtoritatoj urĝan ekzamenon de la juĝa proceduro kontraŭ doktoro Miguel Ángel Beltrán, profesoro en la Nacia Universitato de Kolombio, kaj permesu lian tujan liberigon.

La Internacio de Edukado, kiu reprezentas la sindikatojn de instruistoj en la tuta mondo, petis formale revizion de la afero, lian liberigon kaj reakiron de liaj civilaj kaj universitataj rajtoj. Li bezonas vian subtenon. Se ni inundas la kolombian registaron per protestmesaĝoj, ni helpos lian liberigon.

Eblas sendi tiucelan mesaĝon pere de jena retpaĝo:

[https://www.labourstartcampaigns.net/show\\_campaign.cgi?c=3011](https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3011)

*Informoj el LabourStart*



**Miguel Ángel Beltrán**

# Gambio: justeco por Sheriff Diba

Komence de februaro 2016, sindikatoj de la ŝoseotransportoj en Senegalio lanĉis blokadon de la Gambia landlimo, kies prezidento unuflanke centobligis la prezon de la landlima imposto por la kamionoj kiuj eniras en la landon. Samtempe la kamionistoj en Gambio petis de sia registaro malaltigon de la podetalaj prezoj de la karburadoj konforme al la pogranda prezoj. Rezulto? La prezidento malpermesis la sindikatajn aktivaĵojn kaj arestis tri sindikatajn gvidantojn. Unu el ili, Sheriff Diba, el la GNTCA (Nacia Asocio pri Kontrolo de la Transportoj) mortis en malliberejo. Laŭ atestoj, li suferis de la perforta konduto fare de agentoj de la

Nacia Agentejo pri Informoj. Ni postulas justicon por Sheriff kaj ties gambiaj kaj senegalaj kolegoj.

Pete de la Internacia Federacio de la laboristoj de Transportoj, estis lanĉita retkampanjo postulanta justicon por Sheriff kaj ĉesigon de la represio. Eblas subteni ĝin per jena retpaĝo:

[http://www.labourstartcampaigns.net/show\\_campaign.cgi?c=2997](http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2997)

*Informoj el LabourStart*



**Sheriff Diba**

Antaŭ 50 jaroj

# 13 monde famaj Civitanoj de la Mondo alvokas

Manke de supernacia leĝaro la ŝtatoj estas devigataj kalkuli je forto por defendi siajn interesojn. Konsekvenco: la milito, ĉu vola ĉu akcidenta, iĝanta, depost la atoma malintegro kaj la disvolviĝo de la bakteriaj armiloj, la absurda “fina solvo”, la genocido vastigita al la tuta homa raso.

Manke de tutmondaj institucioj kapablaj certigi la kontentigon de la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj, la homa persono estas ofendmokata. Dum grandegaj riĉaĵoj estas malŝparataj, du trionoj el la homaro suferas malsaton.

Tamen la sciencaj kaj teknikaj progresoj ebligas organizadon de tutmonda komunumo, en kiu regus paco kaj abundo, en kiu la fundamentaj liberecoj estus garantiataj al la individuoj, al la popoloj, al la nacioj.

Kial ne estas tiel? Ĉar la registaroj hipnotizitaj de sia devo antaŭigi la naciajn interesojn de sia lando, for de konsento pri la necesaj transformadoj, eĉ malhelpas la agadon de la internaciaj institucioj kreitaj por defendi la universalan pacon kaj servi la homon.

Tial, la savo povas veni nur de la monda popolo, de la individuoj ĝin konsistigantaj, de ĉiu el ni.

La unua ago, simpla sed efika, al kies plenumo ni invitas ĉiun el vi, kiel ni mem faris, konsistas registri sin kiel MONDCIVITANON.

La dua paŝo, kiun ni kune faros, se vi sufiĉe multnombre respondos al nia alvoko, estos organizi sur transnacia bazo la balotelekton de delegitoj komisiotaj por defendi la homan aferon, esprimi la depostulojn de la monda popolo, kaj fine ellabori la juron de pacema kaj civilizita mondo.

Subskribis (la 3an de marto 1966):

Lord BOYD ORR (Britio) Nobelpremiito pri paco;

Josué de CASTRO (Brazilo) verkisto de “Geopolitiko de la Malsato”;

Danilo DOLCI (Italio) instiginto de la soci-ekonomia elvolviĝo de Sicilio, Leninpremiito;

SHINZO HAMAI (Japanio) eksa urbestro de Hiroshima;

Prof. J.L. HROMADKA (Ĉeĥoslovakio) prezidanto de “Kristana Packonferenco”;

Prof. Alfred KASTLER (Francio), Nobelpremiito pri fiziko;

S-ino Rayan NEHRU (Hindujo);

Prof. Linus PAULING (Usono) Nobelpremiito pri ĥemio kaj pri paco;

Abato PIERRE (Francio) fondinto de la komunumoj “Emaus”;

Jean ROSTAND (Francio), biologo, membro de la Franca Akademio;

Lord Bertrand RUSSELL (Britio) filozofo kaj matematikisto, Nobelpremiito pri literaturo;

Prof. Ivan SUPEK (Jugoslavio), membro de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj;

Prof. HANS THIRRING (Aŭstrio), membro de la Scienca Akademio.

Post 50 jaroj tiu alvoko restas plej aktuala. Monda civitaneco disvastiĝis al la tuta planedo, sed multo farendas al la politika unueco necesa por la defendo de la homa afero.

*Sendita de Mondcivitana Asembleo*

*Fonto: <http://www.recim.org/cdm/cit13eo.htm>*



# Daŭripovo – Resilienco – Transformo (Superrigardo)

La kompilaĵo donas koncizan super-rigardon pri difinoj, konsekvencoj kaj interrilatoj de la nocioj/konceptoj, kiuj validas por estonta kaj futurinda mondovasta evolu(ig)o de paca, demokratia kaj sociale justa homa socio (kulturo) kaj de ties medio/kunmondo (naturo). Fono por tio estas la centra demando: “Kiel ni povas ekde la ekonomikcentrigita kulturo de tutmondigo atingi soci(al)-ekologian kulturon de daŭripovo?” [1]

## 1. Devenpunkto:

2030-Agendo por Daŭripova Evoluo de la UN (celoj)

En la 2030-Agendo por Daŭripova Evoluo de la UN (2015) enmetatis la nocio “resilienco” (angle: *resilient*) en la priskribo koncerne du el entute 17 celoj de daŭripova evolu(ig)o (angle SDG = *Sustainable Development Goals*). [2]

La celo 9 postulas la kreon de resiliencia infrastrukturo, krome, de progresigo de inkluda kaj daŭripova industriigo kaj novigoj.

La celo 11 postulas la formadon de inkludaj, sekuraj, resiliencaj kaj daŭripovaj urboj kaj homaj setlejoj.

En ambaŭ celoj, por la originala angla vorto *resilient* uzatas en la germana teksto la vorto *widerstandsfähig* (esperante: kontraŭstaripova, rezistopova).

(Rimarko: Jam en la jaro 2000 la nocio “resilienco” aperas en la dokumentoj de la UN-suborganizaĵo International Strategy for Disaster Reduction, ISDR (esperante: Internacia Strategio por la Redukto de Katastrofoj). Kiel celo nomatas tie la kreo de katastrofo-resiliencaj komunumoj per progresigo de alta konscio pri la signifo de katastrofo-redukta kiel integra parto de daŭripova evoluo. Deklaratas, ke politiko de resilienco postulas la priatenton de preskaŭ ĉiuj fizikaj-ekologiaj kaj soci(al)ekonomiaj fenomenoj de nia planedo. [3])

En la novaj celoj de daŭripovo uzatas la nocio “daŭripova” pli multe rilate celojn, kiuj ligatas al aktivecoj de la homa socio kiel intervenoj en la vivmedion (kiel 1. Agrikulturo, 6. Akvo-kaj sanitar-mastrumado, 7. Energi-provizo, 8. Ekonomia kresko, 9. Industriigo, 14/15. Utiligo de la oceanoj kaj de firmteraj ekosistemoj), pro kio sekvenas el tio, ke per “daŭripova evoluo” pli unuarange intencatas la aktiva evoluigo ol la pasiva evoluo (17.). Kontraŭe, “resiliencia” preferinde estas la nocio por stato aŭ eco (kiel tiuj de 9. Infrastrukturoj kaj 11. Urboj kaj setlejoj).

## 2. Soci(al)-ekologia graveco

Tute ĝenerale, la tri nocioj “daŭri-

povo”, “resilienco” kaj “transformo” estas kaj priskribaj kaj normdonaj – ambiguaj laŭ signifo kaj ofte uzataj kadre de variaj valor- kaj cel-konceptoj, ideologioj, politikoj (ekz. “daŭripovaj profitoj” aŭ “resiliencia maĝumo”). Ĉi kunmetaĵo orientiĝas ekskluzive je soci(al)-ekologie

## 3. Daŭripovo

3.1. Principe daŭripovo rilatas al aktiveco, kiu povas esti praktikata kontinue sen kaŭzi damaĝojn por la naturo kaj/aŭ socio.

3.2. Termino el la forstkulturo

“Faligi nur tiom da arboj, kiom povas elteni la arbaro! Nur tiom da ligno, kiom povas rekreski!” Tiel la unua formulis Hans-Karl von Carlowitz en la jaro 1713 la principon de daŭripovo en sia libro pri la ekonomio de la arbarkulturo *Sylvicultura oeconomica*.

3.3. Teni la mondon en ekvilibro

Ekde ĉi unua difino la nocio de daŭripovo pluevoluis. Tiam karakterizinte la fundamentojn de la forst-ekonomio, ĝi hodiaŭ priskribas vojon teni la mondon en ekvilibro. La kerna ideo: Longperspektive, ni ne rajtas vivi je kostoj de homoj en aliaj regionoj de la Tero kaj de estontaj generacioj. Vivmedio, ekonomio kaj socio influadas unu la alian. Longtempe, ne estos ekonomia kaj socia progreso sen nedamaĝita vivmedio. Sammalmulte, ni ne sukcesos protekti efike la vivmedion, se homoj devas lukti por sia ekonomia ekzisto. Daŭripovo tuŝas ĉiujn sferojn de la ĉiutago kaj atingebblas nur per internacia kunlaboro.

3.4. Minacataj vivofundamentoj de la venontaj generacioj

Ekonomia sistemo kaj vivostilo – aparte en la industriŝtatoj – devas ŝanĝiĝi, pri tio estas ankaŭ politika unanimeco ekde la 1990-aj jaroj. Ĉar la ekonomia kaj teknika progresoj laŭ la ĝisnuna modelo minacas la



vivmedion kaj pro tio la vivobazon de la venontaj generacioj. Samtempe, homoj en multaj ŝtatoj devas vivi en mizero kaj ricevas nenian utilon el la bonstato en aliaj mondregionoj.

3.5. Daŭripova evoluo kiel politika gvidprincipo

Surbaze de ĉi ekonoj la t.n. Brundtland-Komisiono de la UN postulis en la jaro 1987 nov-orientiĝon kaj liveris jenan difinon pri daŭripova evoluo: “Daŭripova evoluo estas evoluo, kiu sekurigadas la vivokvaliton de la nuna generacio kaj samtempe konservas por venontaj generacioj la elekteblojn pri la formado de ilia vivo.” En la Pintkonferenco de Rio de Janeiro en la jaro 1992, 178 ŝtatoj interkonsentis surbaze de la Brundtland-Raporto pri komuna gvidprincipo de la homaro por la 21-a jarcento – la daŭripova evoluo.

3.6. Daŭripova evolu(ig)o

- zorge traktas la naturon;
- altigas la laborkapaciton de la ekonomio kaj certigas la estontecon;
- estas justa kaj helpas al la paca kunvivo de la homoj.

3.7. Kleriĝo havas altan rangon

La Rio-de-ĵanejra Pintkonferenco per la Agendo 21 akceptis konkretajn agadproponojn – kaj por la ŝtatoj kaj por la unuopaj civitanoj. En ĉapitro 36 la aŭtoroj emfazas la altrangan signifon de kleriĝo: “Sen ampleksa ŝanĝiĝo de la konscio sur ĉiuj niveloj (estos) nenia daŭripova evoluo.” [4]

## 4. Resilienco

4.1. La nocio “resilienco” ekzistas ekde la komenciĝo de la 19-a jarcento, kaj akceptatis, pli kaj pli, ekde la 1990-aj jaroj en sciencoj/politiko/kulturo. [5]

4.2. La vorto derivatas de la latina *resilire* por resalti (aŭ salti reen); temas pri resaltado en originan

(pra)staton.

4.3. Simile kiel daŭripovo, resilienco rilatas al sistemoj kiel strukturitaj kaj funkciantaj tutaĵoj, kaj al ties konduto sub streso kaj perturboj (akcidentoj, malfunkciadoj, urĝkazo). “Streso kaj resilienco rilatas al diversgrandaj entoj, kiel personeco al afekci-procezanta sistemo, la vivmedio al polurita ekosistemo kaj la socio al soci-teknika sistemo.” [6]

4.4. La nocio rolas en la material-esploroj (elasteco ktp.), en la fiziologio (streĉoj kaj adaptiĝoj – alarmo, rezisto per adaptiĝado, daŭra elĉerpiĝo), en la psikologio (lezebleco kaj imanenta protektopovo, elasta strukturo, adaptiĝpovo, frustrotolero), en la ekologio (persisto pere de multstabileco, adaptiĝa kapacito, ŝarĝlimoj por esencaj homeostataj mekanismoj de ekosistemoj), en la ekonomio (adaptiĝa riskomastrumado, portfolio-koncepto). [6]

4.5. Resilienco demandas pri “la ecoj kaj procezoj, kiuj kapabligas iun aŭ ion esti malpli inklinaj perturbiĝi, kaj transiri sen difektita identeco de unu stato al alia”. [5] El la klimato-esplorado venas jena difino: Resilienco estas la povo de sistemo adaptiĝi al ŝanĝiĝoj sen transpaŝi kritajn punktojn (renversopunktojn) kaj resti ene de determinita ordo-skemo, kiu per ŝanceliĝoj ĉiam denove mem-organize reĝustiĝas.

4.6. Resilienco amplekse aplikatas en urboplanado/mediopolitiko. H. Kegler (Universitato Kassel) liveras koncerne tion la karakterizon “rezistema kaj lerna urbo.” Nocioparoj, kiuj deriviĝas el la surresilienco bazita kompreno pri planado por urbaj spacoj, estas fortikeco-fragileco, kompakteco-malcentreco, aŭtarkio-interŝanĝo, redundanco-diverseco, stabileco-



fleksebleco, moduleco-komplekseco. [7]

4.7. Resilienco estas ne nur pasive priskriba. Kiel normiga/aktiva koncepto validas la tri alpaŝoj/dimensioj:

4.7.1. Persisteco de sistemoj, t.e. rimedoj por defendo kontraŭ danĝeroj kaj riskominimumigo (memkonservado).

4.7.2. Adaptiĝado, t.e. la kapablo kunekzisti harmonie kun rapide ŝanĝiĝanta medio.

4.7.3. Transformiĝo, t.e. la povo krei novajn strukturojn kaj sistemojn, ĉar la ekzistantaj ne plu estas viv-kapablaj, transiro en novan pli daŭropovan staton (soci(al)-ekologia ŝanĝiĝo kun repensado pri gvidvaloroj kaj ĉefaj celoj), vd. malsupre. [5]

## 5. Daŭripovo, resilienco, transformo (interrilatoj)

La interligiĝo de la tri nocioj/ideoj sub la kapvortoj “soci-kultura ŝanĝiĝo” (ankaŭ Granda Transformo) kondukas al konceptoj/valor- kaj agad-modeloj kun variaj fokuso.

Ĉe tio temas pri la respondo al la demando de D. Brocchi komence de ĉi kompilaĵo (vd. supre).

La problemo estas, kiomgrade “la nociparo resilienco/transformo helpas al pli bona efektivigo de daŭripovo/daŭripova evolu(ig)o (krom paco kaj homaj rajtoj la tria gvidprincipo de la UN).” [8]

La koncepto “Granda Transformo” implicas, laŭ programo de la WBGU (Wissenschaftlicher Beirat der Bundesregierung Globale Umweltveränderungen, esperante: Scienca Konsilkomitato de la Federacia Registaro pri Terglobaj Vivmediŝanĝiĝoj) de Germanio, “neceson por ŝanĝiĝo de la socio, se turniĝo al daŭripova evoluo estu realigata. Ĉe tio temas kerne pri traktato de la monda







socio por klimato-respekta kaj daŭripova ekonomia ordo kiel kombinaĵo de kulturo de zorgemo (ekologia responseco), kulturo de partoprenigo (demokratia responseco) kaj kulturo de devontigo por la venontaj generacioj (alfutura responseco). Sen efika klimato-protekto antaŭvideble nuligigas la esencaj evoluebloj de la homaro. La tri gravaj kampoj de transformo estas energio, urbigo kaj tereno-utiligo.” [9]

Sub la perspektivo de tergloba sistemo kaj konekse kun ties subsistemoj “resilienco ofte estas la problemo kaj ne la solvo. La subsistemoj kontraŭstaradas al la ŝanĝ-procezoj kaj ilia persistopovo malhelpas la necesajn evoluon kaj transformon de la tuto. La spitemo kaj rezistemo de subsistemoj devas esti ‘bridata’, por ke la tutsistemo estu supervivo-pova. Kelkfoje, tamen, la sendependeco de moduloj povas konsiderinde altigi la resiliencon de la tutsistemo. Etikan orientiĝon por la ofte malfacila ekvilibro inter sendependeco kaj submetiĝo/enordiĝo povas prezenti la principo de subsidiareco, kiu postulas, ke la aŭtonomio de la subsistemoj devas esti aktive evoluigata/prosperigata de la superaj unuoj kaj estu reduktata nur, se tio montriĝas necesa por la ĝenerala bono. [10] La subsidiara funkcio de la subsistemoj devas do esti priatentata kaj efektivigata.” [5] Ĉi konstatoj tre esence celas al la nuntempa merkat-orientita tutmondigo kaj al politikaj/ŝtataj malcentrigoj.

“En la diskurso pri resilienco” (kontraste al la orientiĝo je stato) la adaptiĝado alprenis certan ŝlosilan pozicion. Ĉe la adaptiĝado ne prioritatas la evito de deeksteraj ŝanĝiĝoj, krizoj kaj ŝokoj, sed la lernado pri rezistokapablo koncerne perturbojn kaj pri pliperfektiĝo koncerne sukcesan traktadon de ŝanĝiĝoj. [5] Fono de ĉi alpaŝo estas la tezo, ke la homa socio ne (plu) povas deturni la t.n. “overshoot” (angle por la transpaŝo de la daŭripovokapacito de la Planedo). [11]

Lastinstance temos pri kombinado de strategioj pri daŭripovo (kulturoj de daŭripovo) kaj de strategioj pri adaptiĝado (kulturoj de resilienco). “Per tio gajnatas tempo por ekfunkciigi ŝanĝiĝon de la aktuale domina ekonomia, soci- kaj kultur-modelo. Gvidcelo estu eviti transformon per katastrofo [12].” [5]

La interligiteco de la nocioj/konceptoj daŭripovo, resilienco kaj

transformo karakterizeblas laŭ H. Kegler jene [7]:

Resilienco liveras sistemecan alpaŝon al la planado kaj formado de nia mondo kaj de ties estonteco direkte al socia transformprocezo, kaj ne reduktiĝas al nura reagado je perturboj. Ekzistantaj strukturoj estu transigataj en elastajn/rezistopovajn, lernkapablajn kaj futurindajn, por malefikigi naturdevenajn kaj/aŭ homfaritajn perturbojn kaj, ĉe tio, konservi la funkcikoncernajn ecojn, samkiel renovigi ilin.

**Resilienco tiel fariĝas la fundamento de evoluo direktata al daŭripovo, la gvidkoncepto kaj metodiko de stabila daŭripovo surbaze de sistem-, cel- kaj transform-scio.** Plisimpligite, oni povas diri: Daŭripovo estas la celo, resilienco la vojo, transformo la fono. Priskribatas tiel koncepto por “transformo de la socio, kiu science, planade kaj kulture celas ‘biosferan komunumon’ kun klimatoneŭtraleco, resursocikloj kaj soci(al)-kultura ekvilibro.” [7]

**Kompilis:**

Wolfgang Guenther  
Esperanto-Centro Harleshausen,  
Kulturinitiative Harleshausen e.V. –  
Forumo “Kulturoj de daŭripovo”  
(KdD)  
Kassel, Germanio  
w.guenther.esperanto@web.de  
2015

**Literaturo**

[1] Brocchi, D.; Die kulturelle Dimension der Nachhaltigkeit.  
[2] United Nations; Transforming Our World: The 2030 Agenda for Sustainable Development; germane: Die Bundesregierung; 200-Agenda und Millenniumsziele.  
[3] United Nations; Living With Risk: A Global Review of Disaster Reduction; Vol.1; 2004.  
[4] Germane: UNESCO-Kommission; Was ist Nachhaltigkeit?  
[5] Vogt, M.; Zauberwort Resilienz, Akademie Tutzing, 2015.  
[6] Zeitkritische Forschungen; 3/2014; Resilienz: Mensch-Umwelt-System, Eine Geschichte der Stressbewältigung von der Erholung zur Selbstoptimierung.  
[7] Kegler, H.; Resilienz – Strategien & Perspektiven für die widerstandsfähige und lernende Stadt.  
[8] vgl. artec-Kolloquium; Uni Bremen; 2010/2011; Nachhaltigkeit versus/zwischen/durch Resilienz und Transformation.  
[9] WBGU: Welt im Wandel, 2011.  
[10] Ostheimer, D.; Über die gesellschaftstheoretische Offenheit des Subsidiaritätsprinzips; in: Jahrbuch der Christlichen Sozialwissenschaften 53; 2012.  
[11] Meadows, D.; The Limits of Growth and the Future of Humanity, Carson Center, Munich, 2012.  
[12] Sommer, B./Welzer, H.; Transformationsdesign. Wege in eine zukunftsfähige Moderne; Transformationen, Bd.1, München; 2014.

# Kafka: Antaŭ la leĝo...

## Ĉerpitaĵo el la tradukita romano “La proceso”

Antaŭ la Leĝo staras pordogardisto. Al tiu pordogardisto venas viro de la kamparo kaj petas pri tio, ke oni enlasu lin en la Leĝon. Sed la pordogardisto diras, ke li nun ne povos permesi la enlason al li. La viro pripensas tion kaj tiam demandas, ĉu li do poste rajtos eniri.

“Estas eble”, diras la pordogardisto, “sed ne nun.” Ĉar la Leĝo estas malfermita kiel ĉiam kaj la pordogardisto paŝas flanken, la viro kliniĝas por vidi tra la pordo internen. Rimarkante tion, la pordogardisto ridas kaj diras: “Se tio logas vin tiom, tiukaze provu eniri do spite al mia malpermeso. Sed notu: Mi estas potenca. Kaj mi estas nur la plej suba pordogardisto. De salonego al salonego tamen staras pordogardistoj, kiuj estas pli kaj pli potencaj. Jam la aspekton de la tria eĉ mi ne povus elteni plu.”

Tiajn malfacilaĵojn la viro de la kamparo ne atendis; la Leĝo estu alirebla ja por ĉiu kaj ĉiam, li pensas, sed kiam li nun pli zorgeme rigardas la pordogardiston kun ties peltomantelo, lian grandan pintan nazon, la longan maldensan nigran tataran barbon, li decidas tamen prefere atendi, ĝis li ricevos la permeson eniri. La pordogardisto donas al li tabureton kaj permesas al li eksidi flanke de la pordo. Tie li sidas dum tagoj kaj jaroj. Li ofte provas esti enlasata kaj lacigas la pordogardiston per siaj petoj. La pordogardisto ofte iom esplordemandas lin, demandas lin pri ties hejmlando kaj pri multaj aliaj aferoj, sed estas indiferentaj demandoj, kiajn metas grandaj sinjoroj, kaj je la fino li ĉiam diris denove al li, ke li ankoraŭ ne povas enlasi lin. La viro, kiu ekipis sin por la vojaĝo per multaj aĵoj, uzas ĉion, kiel ajn valora ĝi estas, por subaĉeti la pordogardiston. Tiu ja ĉion akceptas,

sed dum tio diras: “Mi akceptas tion nur tial, por ke vi ne supozu, ke vi preterlasis ion.”

Dum la multaj jaroj la viro observas la pordogardiston preskaŭ seninterrompe. Li forgesas la aliajn pordogardistojn, kaj tiu unua ŝajnas al li la ununura obstaklo por povi eniri en la Leĝon. Li malbenas la malfeliĉigan hazardon en la unuaj jaroj laŭte, pli poste, maljuniĝante, li nur grumblas plu al si mem. Li fariĝas infaneca, kaj ĉar dum la multjara studado de la pordogardisto li konatiĝis ankaŭ kun la puloj en ties peltokolumo, li petas ankaŭ la pulojn helpi al li ŝanĝi la opinion de la pordogardisto. Finfine lia vidkapablo malfortiĝas,

kaj li ne scias, ĉu vere malheliĝas ĉirkaŭ li, aŭ ĉu nur liaj okuloj trompas lin. Sed certe nun li rimarkas en la malhelo brilon, kiu neestingeble penetras el la pordo de la Leĝo. Nun li ne plu vivos longe. Antaŭ lia morto kolektiĝas en lia kapo ĉiuj spertoj de la tuta tempo en unu demando, kiun li ĝis nun ankoraŭ ne metis al la pordogardisto. Li mansignas al la pordogardisto, ĉar li ne plu povas rektigi sian rigidiĝantan korpon. La pordogardisto devas profunde kliniĝi al li, ĉar la altodiferenco ŝanĝiĝis tre malfavore al la viro.

“Kion vi nun do ankoraŭ volas scii?” demandas la pordogardisto, “vi estas nesatigebla.”

“Ĉiuj aspiras ja la Leĝon”, diras la



viro. “Kial okazis, ke dum tiuj multaj jaroj neniu krom mi deziris la enirpermeson?” La pordogardisto rimarkas, ke la viro jam proksimas al la fino, kaj por ankoraŭ atingi la orelojn de la surdiĝanto, li kriegas al li: “Tie ĉi neniu alia krom vi povis ricevi la enirpermeson, ĉar tiu enirejo estis destinita nur por vi. Mi nun iros kaj fermos ĝin.”

Tradukis: Cezar

Fonto: [http://www.karapaco.de/u/kafka/kafka\\_proceso.pdf](http://www.karapaco.de/u/kafka/kafka_proceso.pdf)



# Karaj rimoj? Araj krimoj!

## Kiam vortoj kaj literoj lude dancas Intervjuo kun Christian Cimpa

La 15-an de decembro Kurt Lhotzky okazigis la duan fojon la Librotagon en sia librovendejo kun kafejo en Vieno [1]. Vespere Christian Cimpa prezentis vortludojn en Esperanto: enkonduke la gastaro povis aŭdi formojn, jam konatajn en Esperanto: palindromojn – ekzemple: “Marda dram”, “Ruzeca cezur”, “Drola lord”, “Atako kata”. Poste sekvis alia formo, ankoraŭ ne tre konata en Esperanto.

**Uwe Stecher:** S-ro Cimpa, vi laboras en la Viena Esperanto-Muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj, estas verkisto de germanlingvaj kanttekstoj, tradukisto, poeto, desegnisto. Okaze de la Librotago vi prezentis interalie Esperantajn versojn rimajn. Tiaj nomiĝas en la germana *Schüttelreime* (laŭvorte “skuitaj rimoj”). Ĉu vi bonvolus klarigi al nia legantaro la specialajn trajtojn de tiu ĉi rimformo?

**Christian Cimpa:** Volonte, kaj mi nepre unue volas danki Kurt Lhotzky, kiu en sia “Literaturbuffet” jam la duan fojon aranĝis Librotagon kun tre bona programo. Lia invito kontribui estis granda honoro por mi. Kaj mi kredis inde prezenti mondan premieron: La unuan ekskluzivan legadon de speciala rimformo.

Laŭ la difino de “Schüttelreim” en la germana “Brockhaus” temas pri duobla rimo, kies rimantaj silaboj interŝanĝas la komencajn konsonantojn. Tio ŝajne ne kondukas nin al pli bona kompreno de la afero. Tamen difinoj ofte sonas pli komplikaj ol la realo. Oni tre facile kaptas la esencon, kiam oni rigardas ekzemplon. Kaj tiu difino almenaŭ plene validas por Esperanto. En la germana jam ekzistas tri-, kvar- kaj kvinoblaj rimoj kun konsonantinterŝanĝo.

**US:** Tiu rimformo estas tre konata en la germana kaj ankaŭ en la hungara (kecskerim). Ĉu ekzistas similaj formoj en aliaj lingvoj?

**CC:** Dankon pro la sciigo. Mi ĉiam demandas alilingvajn personojn, ĉu en

ilia lingvo la fenomeno estas konata. Malgraŭ la fakto, ke la hungara estas la lingvo de niaj tre ŝatataj najbaroj, mi ĝis nun ne sciis, ke en ĝi ekzistas ekzemploj de tiu rimformo. Konsiderindajn literaturojn mi konas speciale el la franca kaj la germana. En la angla la fenomeno almenaŭ estas konata.

**US:** Kiuj Esperantaj esprimoj ekzistas por tiu rimformo?

**CC:** La Esperanta esprimo estas “kontraŭknalaj rimoj”. “Kontraŭknalo” estas laŭvorta traduko de la franca nomo “contrepèterie”, konsistanta el la elementoj “contre” kaj la verbo “péter”. “Contre” memkompreneble signifas “kontraŭ”, “péter” estas franca por “kraki”, “knali”, “furzi”. Ŝajne estis Raymond Schwartz la respondeculo pri tiu nomo, ĉar estas li, kiu faris la unuajn kontraŭknalajn rimojn en Esperanto. Tamen mi ne estas tre feliĉa pri tiu esprimo, ĉar laŭ mi ĝi tro emfazas la klaŭneskan aspekton. En ĝi tute ne speguliĝas la alia flanko, tiu de serioza lingva artaĵo. Se oni dubas pri tiu kvalito, oni bonvolu relegi la supre donitan difinon.

**US:** Kiun esprimon vi proponas por anstataŭi “kontraŭknalo”?

**CC:** En la natursciencoj estas neskuebla regulo, ke la rajto pri nomado ekzemple de nova specio apartenas al la unua priskribanto. Ankaŭ mi volas pagi mian respekton al Raymond Schwartz kaj principe lasi la nomon tia, kia ĝi estas. Mi nur hezitas traduki ĝin Esperanten. Nomformo kiel “kontrepetra rimo” estus laŭ mi preferinda. Tiu ne estas rekte komprenebla, do oni ne aŭdas ion pri knalo aŭ furzo. Tial tiu nomo ne kontraŭstaras al la respekto, kiun tiu lingva artaĵo meritas. Kaj ĝi ne tro devojiĝas de la unua propono de Schwartz.

**US:** La unua parto de la esprimo “kontrepetra” kopias la francan signifon: vortludo ŝanĝanta literojn aŭ silabojn por ricevi novan esprimon.

**CC:** Jes. Aŭ eĉ tutajn vortojn. La franca “contrepètrie” celas al interŝanĝo de klare difinitaj litergrupoj, kiuj post sia relokado denove donu sencon. Oni ne intermiksi tion kun anagramoj, kiuj novaranĝas la unuopajn literojn.

**US:** Ĉu ĝi eble neglektas la literaturan tradicion germanan, kiu ekzistas ekde la 13-a jarcento, kaj la hungaran? Tiuj du menciitaj formoj ja



Christian Cimpa

estas kontraŭaj al la francaj rimformaj.

**CC:** Ne neglektas. La difinoj ja estiĝis en diversaj lingvaj kaj kulturaj spacoj, je diversaj tempoj kaj cirkonstancoj. Ili do tute ne interdependas. Sed vi prave konstatis gravan diferencon: En la germana kaj evidente ankaŭ en la hungara la rezulto devas esti rimo, en la franca ne. Tial mia preferata Esperanta esprimo estas “kontrepetra rimo”.

**US:** Vi publikigis libron en la germana kun la titolo “Shaking Troja” [2]. La verko rerakontas la Homeran epopeon Iliado ne nur en formo de kontrepetraj rimoj, sed ankaŭ uzas la version de la epika poezio: la heksametron. Kiamaniere vi donis al la konata historio novan vidpunkton kaj personan aliron?

**CC:** Nu, se oni reverkas libron, mia opinie ne sufiĉas “traduki” ĝin, ekzemple de prozo en rimantan formon, eĉ se temas pri kontrepetraj rimoj. Noveldono de malnova temo postulas ankaŭ novan enhavan aspekton. Kaj speciale, se temas pri antikva rakonto kiel tiu de la Troja milito, historio ludanta antaŭ 3300 jaroj kaj surpaperigita (ne sur paperon) antaŭ 2800 jaroj. En tiu kazo eĉ necesas tute nova pozicio de la verkanto, ĉar la etikaj normoj ekde la Homera tempo draste ŝanĝiĝis.

**US:** Ĉu vi havas versojn el la libro en Esperanto por ke la legantaro povu havi ekzemplon?

**CC:** Jes, jen laŭsenca traduko sen kontrepetraj rimoj:

Priamos nun al Hekabe por ĉiamaj tempoj sin ligis.

Foje rakontis ŝi songon al li, kiu ŝin nervozigis.

“La seksumado en lito kun vi nun sentigas min naŭzon.

Tio nur en konsekvencoj teruraj ja havas la kaŭzon.

Ĉar se mi naskos fileton, ĝi vekos gepatran amemon,

tamen ĝi ankaŭ alportos al ni ege gravan problemon...”

(Originalo:

*So hat sich Priamos für alle Zeit an Hekabe gebunden. Die musste ihm einst einen Traum mit nervösem Gehabe bekunden:*

*“Dass ich mich derzeit so unwillig mit dir im Bett vor dem Sex wind, hat einen Grund, nämlich, dass schlimme Dinge zu uns unterwegs sind!*

*Krieg ich ein Bübchen, wirds hübsch, aber trotz aller Creme ein sehr blasses, und wir zwei haben mit ihm*

*dann am Schluss ein Problem, ein sehr krasses.”)*

**US:** Koran dankon! Kiel menciite, vi prezentis viajn rimojn en Esperanto okaze de la Librotago. Tio ne nur amuzis la aŭskultantaron, sed la rimoj ankaŭ povas levi la lingvan nivelon kaj komprenemon ekzemple per pripensado kiel estu la sekvanta frazo. Eble viaj versoj instigas reeltrovi bazan trajton de Esperanto: la ludeman, kreivan aliron al la lingvo. Ĉu vi bonvole malkaŝas al nia legantaro viajn plej ŝatatajn rimojn kaj ĉu vi planas eldonon Esperantan de tiuj rimoj?

**CC:** Jes, vi eĉ pravegas en tio. Esperanto pliriĉiĝas daŭre pro la influoj de multaj kulturoj, kun kiuj ĝi estas en senpera kontakto. Tio estas alta kvalito de nia lingvo kaj ni nepre flegu ĉiujn eblajn aspektojn, do ankaŭ la ludan aliron al lingvaj formoj. Tia altnivela humura lingvoludado tradicie estas kontribuata de francoj. Nuntempe mi tre ŝatas la SAT-Amikaran cirkon ĉirkaŭ Serge Sire [3]. Kaj mi kredas, ke sur tiu kampo ankoraŭ kaŝiĝas granda kvanto da amuzo.

Jes, mi certe iam eldonos libron kun kontrepetraj rimoj en Esperanto. Fakte ĝi jam kuŝas duonpreta en mia tirkesto. Vere preta ĝi iĝos, post kiam mi trovis ilustranton, kiu siavice faru la tradukon de la vorta lingvo al la bilda. La bilda lingvo kaj Esperanto estas ja kvazaŭ gefratoj. Eble dum la Librotago 2016 oni vidos novan libron en “Lhotzkys Literaturbuffet”.

**US:** Koran dankon pro la intervjuo!

## Kelkaj kontrepetraj rimoj de Christian Cimpa, elektitaj de li

**Mia edzino**

Ŝia rideto, kia mildo balsama!

Se ŝi koleras – nu, bildo malsama.

**La naturo**

Viv’ printempe floramas,  
dum somer’ kolorfamas,  
en aŭtuno orflamas  
fine vintre forlamas.

**Jack the Ripper**

Jakobo la tranĉulo estis morta fakulo.

Kutime oni tion taksas forta makulo.

**Lastaj vortoj**

Goethe genie verkadis per sprita kaj solida plumo.

Sed liajn plej famajn vortojn li diris per buŝ’: “Pli da lumo!”

**Edife muziki zume, fide**

Ĉar Schubert ne mem volis pritrakti kantojn,

li dungis por tio du, tri praktikantojn.

UWE STECHER

Fonto: Esperanto aktuell (1/2016)

[1] [www.Literaturbuffet.com](http://www.Literaturbuffet.com)

[2] [www.klangreime.at](http://www.klangreime.at)

[3] Serge Sire, franca desegnisto, verkas ĉefe bildrakontojn, kunlaboras en multaj gazetoj, ĉefe en la satira revuo *La KancerKliniko*.



Christian Cimpa



# La KancerKliniko

## Politika Kultura Skandalema Ajnista

LKK naskiĝis en “vintro” 1976. En la numero 0 ni, J-P Danvy, Laŭrenco Septier kaj mi mem, aperigis deklaron en 12 punktoj. Jen la plej gravaj kiuj daŭre restas aktualaj.

Kial ni kreas tiun gazeton?

1. por ŝtopi truon.
2. por nedevige publikigi senspritaĵojn, senspicajn kaj seninteresajn artikolojn sub preteksto de liberesprimado.
3. por malhelpi skrupulojn pri artikolo, kiu eventuale ne plaĉus al tiu aŭ al tiu ĉi movado.
4. ... por pli atenti pri enhavo kaj malpli pri stilo.
5. por trakti nuntempajn temojn de nuntempa mondo.
7. por nedevige serioze trakti seriozajn temojn kaj por eventuale serioze trakti neseriozajn (temojn).

## 1-a periodo

Por kompreni kelkajn el tiuj punktoj, necesas ekscii, ke la tri kreintoj de LKK tiam prizorgis la gazeton de la SAT-junulfako “La Juna Penso”. Pro daŭraj protestoj de la PK de SAT, sekve de artikoloj kiuj “ne koncernis la laboristojn”, ekz. pri samseksemo aŭ drogoj, ni sentis la bezonon krei gazeton sendependan de iu ajn asocio. Triope ĉe la komenco, ni kiel la musketeroj tuj je l' numero unu iĝis kvar, kun la alveno de Serge Sire. Sed ankaŭ kontribuis ekde la komenco Kris Long, la brita poeto, Georgo Lagrange (nun pli konata sub la pseŭdonimo Elgo), kaj aliaj, kaj preskaŭ tuj poste Stefan MacGill, Giulio Cappa, Michel Duc Goninaz (MDG), Aldo de' Giorgi (AdG), Renato Corsetti, Daphné Lister...

Pro la n-ro 6 venos la unuaj “gravaj” atakoj kontraŭ nia gazeto. Unue pro artikolo de MDG “La teroristoj kaj la justuloj. Sekve de la traduko de La Justuloj de Albert Camus far Georgo Lagrange, MDG verkis tiun artikolon/recenzon. Li aludis la reagojn de germanaj esperantistoj, kiuj ploris la murdon de Schleyer, pranepo de la kreinto de volapuko, far anoj de la

Baader-bando... sed kiuj forgesis diri, ke tiu sama Schleyer estis nazio – sed pri tiu atako poste... Due pro poemo de AdG “Povra stultul”. La poemo de AdG – viro ploras pro la perdita amatino kaj draŝas la rabinton – naskis la koleron de tiu homo! Fakte neniu nomo aperis en la poemo kaj nur intimuloj kaj de la poeto kaj de la celitoj kapablis alkroĉi nomojn al tiu poemo.

Mi iĝas oficiala direktoro kun la n-ro 7 pro soldatservo de Danvy. En la n-ro 8 ni aperigas preskaŭ tute blankan paĝon. Titolo: “La blago de la jaro”? Meze de la paĝo, maldiklitere oni povis legi: “Ni havas la honoron anonci al vi, ke “La verko de la jaro”, premio organizita de LF (ĉefredaktoro GS) [LF: Literatura Foiro; GS: Georgo Silfer] estis atribuita al GS pro lia poemaro “De tempo al tempo”, eldonita de LF (ĉefredaktoro GS)”. Procesminacoj alvenis. Unuaj originalaj kanzonoj de Danvy/Le Puil. Alveno de la poetino nederlanda Rejna de Jong.

En la n-ro 10, artikolo de Jean-Paul Marmin pri la denuncioj de LKK al la polico far iu PD (el Britio). Ĉar fakte tiu ulo dufoje denunciis nin. Li skribis al Marmin: “Kiam aperis la artikolo pri Schleyer en LKK... mi sendis dosieron al la franca polico kun nomoj kaj adresoj de tiaj apogantoj de terorismo, sed la polico ne agis. La redaktoro ne nur ne estas en karcero kie li devus esti, sed transloĝiĝis kaj eĉ sendis al mi novjarajn bondezirojn”. Tiu ĉarma ulo denunciis nin duan fojon ĉe la franca ambasadejo en Londono! MDG realudas tion en Sennacieca Revuo de 1993.

## 2-a periodo

Ĝis tiam LKK estis multobligita en mia hejmo. Tio daŭros ĝis la n-ro 13-a. Ekde la n-ro 14-a ĝis la n-ro 20-a LKK estos presita de Edistudio en Italio. Ni bedaŭrinde rapide konstatis, ke granda parto de la “animo” de nia gazeto forflugis. Artikoloj de Reto Rossetti, Cherpillod, Ŝulco, William Auld.


## 3-a periodo

Serge Sire mem fotokopias kaj enpaĝigas la gazeton. LKK iĝas plie “skandalema kaj ajnista”. Lilia Ledon da Silva, la filino de Gilbert Ledon el Brazilo, alvenas. Naskiĝo de La Krom-KancerKliniko, kiu ebligas publikigi longajn tekstojn aŭ poemaron/teatraĵon, ktp. Ankaŭ naskiĝo de LKK-Krestomatio, kiu bedaŭrinde vivos nur tri jarojn... sed renaskiĝis antaŭ nelonge kun nova Siraĵo. En n-ro 30, aprilo 84, mi jam ekkondamnas nian “faŝiston” Le Pen. En tiu epoko ni ja estis avangardaj! Unu jaron poste Sire rezignas pri enpaĝigo kaj tempe duonkabeas. Septier reprenas la torĉon... nur por unu numero, kun nova klinikano, Poul Thorsen. Kion fari? Restas Le Puil, do mi eklernos tiun laboron.

## 4-a periodo

Mi do pli-malpli lerte enpaĝigas la n-ro 38. Dekaj jaroj kun la n-ro 40. Junulo nekonata el Hungario, István Ertl, sendas al ni mirindan tradukon de la *Stilekzercoj* de R. Queneau. Alian grandan donacon por nia deka datreveno faris Renato Corsetti, kun *Knedu min sinjorino* – insultaj kaj tabuaj esprimoj – kiun ni daŭre vendas! Jam 146 kunlaborantoj kun la





**La 1000-a paĝo de LKK. De dekstre liven:**  
**Hera Elik, Armela LeQuint, Ĵak Le PUIL,**  
**Georgo Lagrange, Laŭrenco Septier,**  
**Serge Sire.**

**Statue staras sur la meblo, Jo-Petro Danvy.**  
**En la kadro, Zorhof**

n-ro 50. (LKK la gazeto kiu baldaŭ havos pli da kunlaborantoj ol da abonantoj!)

## Kampara periodo

Kaj jen ni ricevas de UEA la Premion Grabowski, kiun ni tute ne flaris... sed kiu tamen ne malplezurigis nin! La Krom de 1990 alportos al ni

novajn malagrablajojn. Temas pri *Letero el Palestino*, de Santiago Alba en traduko de G. Kamaço. De nun LKK iĝis antisemita gazeto! Mi ricevis plurajn leterojn, kie oni taksis min antisemito, faŝisto kaj nazio! El tiuj pluraj reagoj nur AdG, kiu ne konsentas kun tiu teksto, afable rebatas. Ekuzo de komputilo kun la n-ro 61. Alveno de Mikaelo Bronŝtejn, kiu ne timas kunlabori en antisemita gazeto!

## Ekde n-ro 70

Kun la n-ro 79 alvenas la dua regula “komiksulo” – ja Arnau desegnas “komiksojn”, cetere vorto kiu eniris la Novan PIV-on. Ekde n-ro 104, finfine LKK havas ret-adreson! En la n-ro 115, por la unua fojo, kontribuantoj de ĉiuj kontinentoj, i.a. Gbeglo Koffi, Trevor Steele, Mao Zifu, Dao Anh Kha, Peter Browne, MDG, Bronŝtejn, Onet, Schram, kaj la aliaj

regulaj kunlaborantoj. Kvar koloraj paĝoj por la n-ro 118: Blubarbo, erotika bildrakonto (Serge Sire plezurigis sin!). En la n-ro 119, sur la kovrilpaĝo oni finfine povas vidi la fotojn de la kvar musketeroj. En LKK-120, ni 30-jariĝas! Kvar kolorpaĝoj far Sire. De la n-ro 123, ĝis hodiaŭ (157) 4 koloraj paĝoj pagataj de mecenato!

Ekde la n-ro 126, LKK iĝas 32-paĝa! Mi kalkulis ke al la dek lastaj n-roj kontribuis proks. 50 homoj el 18 landoj (sed ne plu scias kiom da entute! Cetere plurajn homojn, kiuj sporade kontribuis mi ne citis. Kaj aliajn mi certe forgesis, kiel Cendrino (mia filino!), kiu faris plurajn desegnojn aŭ iu polo, Dr. Moriarty kiu brile komiksis... sed vanuis!)

## Konkludo

Maloŝte gazeto sendependa iĝas 40-jara! Tion ni certe ne antaŭvidis. Ni neniam petis ion ajn de iu ajn. Ĉiuj kunlaborantoj spontane venis en nian Klinikon. Neniam ni atentis ĉu aŭtoro estas konata aŭ ne. Ĉiam ĝojas ni pri tiu mikrado de agnoskitaj aŭtoroj kaj de apenaŭ bakitaj. Ni bedaŭras ke en Esperantio aliaj “satiraj” gazetoj ne ekzistas. Eble kreado de pli morda puŝus nin en ublietojn, sed eble ĝi ankoraŭ pli spronus nin. Fakto estas ke ĝis nun tio ne okazis. Kiel la procesoj, cetere: promesojn, ĉiam nur promesojn!

Kaj nun ek al la 40-a datreveno de LKK!

ĴAK LE PUIL



## INTELEKTA MEMDEFENDO

# Enigmoj

## Solvoj de Serĝo por la antaŭa numero.

- 1) Kalkulo :  $5 \times (5 - (1/5))$
- 2) Falsa ekvacio sufiĉas rigardi ĝin reverse :  $X = I + IX$  (Tio ja estas malfacile komprenebla por homoj kiuj ne kutimas al romiaj ciferoj!).
- 3) Stranga familio: sufiĉas ke estu *minimume* tri knabinoj. Tio aperas klare kaj ne strange se vi aldonas “minimume” al la teksto (minimume, duono el ili estas knabinoj). Formeti “minimume” strangigas la aserton, sed tute ne malverigas ĝin!

## Nova enigm(et)o

En la supra desegno (1000a paĝo de LKK) ĉe la muro troviĝas tiu stranga frazo en kadro :  
 “STULTULO KIEL TEKSTON TIUN RIGARDAS MI LONGE DE JAM”  
 Ĉu komprenebla ?



# Hispana kritika poezio en Esperanto

## Alvoke al la SAT-anaro

La hispana poeto Jorge Maíz, kvankam li ankoraŭ ne eklernis Esperanton, sentas apartan korinklinon al nia afero. Jam en januaro 2014, li sin turnis al konata hispana liberecana aktivulo, Alfredo González, komuna amiko de ni ambaŭ, petante lin serĉi esperantiganton por unu el liaj poemoj. Apenaŭ Alfredo informis min prie, mi plej volonte transprenis la taskon. Tri monatojn poste, mi ricevis el Jorge Maíz kelkajn ekzemplerojn de lia poemaro *Hirsutos y maleantes* [Bruskuloj kaj deliktuloj]. Temas pri brava elmontro de nuntempa engaĝiginta poezio en la hispana lingvo, kun kvar esceptoj: du poemoj aperas en la kataluna, unu en la eŭska kaj unu en Esperanto (ĝuste tiu, kiun pli frue mi tradukis) kun eksplicita dediĉo “al Alfredo, Miguel kaj ĉiuj esperantistoj”. Nelonge poste mi esperantigis kvar poemojn el tiu kolekto kaj prezentis ilin kaj ties aŭtoron en *Sennaciulo*, n-ro 7-8 (1309-1310) Julio-Aŭgusto 2014.

De tiam, miaj kontaktoj kun Jorge Maíz fariĝis ĉiam pli oftaj kaj sukaj. Pasintsomere li retmesaĝis al mi plej interesan proponon. Ekzistas hispanlingva antologio de nuntempa hispana kritika poezio, en kompilo far la renoma juna poeto kaj doktoro pri hispana filologio Alberto García-Teresa, pleja aŭtoritatulo pri tiu temo. En ĝi, legeblas entute 60 poemoj (po tri el ĉiu aŭtoro) de la 20 poetoj tiutere plej elstaraj kaj famaj en Hispanio. Oni intencis fari svedan version de la antologio, kaj Maíz ekpensis, ke eble interesus nin SATeH-anojn realigi esperantan version.

Miaflanke, kompreneble, ke mi interesiĝis. Apenaŭ mi ricevis la originalon, mi ensorbis ties enhavon

kaj tuj poste komencis esperantigi unu poemon post la alia. Temas pri vera juvelo de nuntempa engaĝiginta poezio. Esperante, ĝi havas la titolon *Nova mondo en niaj koroj*. Kiom da belaj vibroj! Tiuj vortoj estas konsistiga parto de jena devizo formulita de la granda hispana liberecana revoluciulo Buenaventura Durruti: *Ni portas novan mondon en niaj koroj. Kaj tiu mondo kreskadas ĉi-momente*. La subtitolo, *Elmontro el nuntempaj hispanaj kritikaj poetoj*, precizigas la enhavon.

Sed la propono de Maíz prezentigis ankoraŭ pli vasta kaj mirinda. Li esprimis al SATeH sian pretecon okupiĝi mem pri la kompostado de la esperantigita antologio kaj pri ties publikigo ĉe la neesperanta anarkisma eldonejo *Calumnia*, de Majorco. Kaj jen plia mirindaĵo: per ĉi verko – cetere, ne strikte liberecana, sed ja kontestema kaj kritika kontraŭ la reganta socia-politika sistemo –, *Calumnia* iniciatos, se ni akceptos, kolekton dediĉotan al publikigo de esperantlingva liberecana literaturo.

Ĉu ni povintus ne akcepti? Ĉu ni rajtintus fordormi la okazon? Ni jesis entuziasme kaj dankoplene. Petite pri elpenso de titolo por la kolekto, ni akceptis proponon far mia kolego kaj amiko la E-verkisto Jorge Camacho: “revo lucida”, du vortoj, kiuj, kunaj, enhavas la radikon “revoluci”, kio donas revolucion sencon al tia lucida revo, kiun ni nomas Esperanto. Kia titolo tiel laŭa al la SAT-spirito!

Unu el la novaĵoj en ĉi kolektiva verko estas la fakto, ke oni aldonis apendice poemojn de tri hispanaj poetoj (Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem), kiuj, por denunci la fiaĵojn de la kapitalisma soci-ordo, elektis ne la hispanan, sed la internacian lingvon. Kaj tio lokas niajn E-poetojn samnivele kun la nacilingvaj kolegoj kaj markas la komencon de interesplena kunlaboro inter unuj kaj la aliaj. Fakte, antaŭ nelonge, ni, ĉiuj kontestemaj poetoj de Esperantujo,



**Alberto García-Teresa**

estis invitataj de García-Teresa al partopreno en grava engaĝiginta poezia revuo, kie niaj poemoj aperos dulingve (esperante-hispane).

La pasintan 29an de januaro, vidis la lumon *Nova mondo en niaj koroj* (*Elmontro el nuntempaj hispanaj kritikaj poetoj*), kompilita de Alberto García-Teresa kaj tradukita kaj komentita de Miguel Fernández. Ĝi aperis kiel la unua numero de la nova – kiom da novaĵoj! – esperanta kolekto “revo lucida”, de la baleara eldonejo *Calumnia*, kiu, krome, invitis SATeH-on aperi kiel kuneldoninto.

Nun estas la vico de ni esperantistoj, ĉefe de ni SAT-anoj. Espereble, nia reago staros je la alto de la faktoj. Pro la malavara entuziasmo de tiu neesperanta – kvankam esperantama – eldonejo al nia afero, ĝi meritus ricevi apartajn atenton kaj dankon el ni kiel legantoj. Kiel la solaj eblaj legantoj! Akirante ekzemplerojn de ĉi verko, ni certe ne nur havigas al ni beletraĵon traĝuindan kaj altkvalitan, sed ankaŭ ebligas la aperon de novaj same allogaj E-verkoj kaj pruvas al la kultura mondo ekster Esperantujo, ke ni esperantistoj vere ekzistas.

La libro, 204-paĝa kaj en la formato 18x13 cm, mendeblas kontraŭ malalta prezo. El ĉi entrepreno la eldonistoj ja ne celas enspezi monon. Ja ili konscias, ke, plej probable, okazos la malo. Sed tio al ili ne gravas. Nur granda simpatio al nia afero instigas ilin konduki tiel. Ni reciproku ilian konduton.

Jen la prologo, per kiu en la libro mi enkuntektigas la krea laboron de la priantologiitaj hispanaj E-poetoj:


## Prologo de Miguel Fernández

Inter la engaĝigintaj hispanaj poetoj, kiuj elektis pripoemi i.a. sian denuncon pri la socia maljusto kaj sian pledon por la rajtoj de la popolo, troviĝas grupo el ili, kiu, plie, elektis fari tion en la internacia lingvo. Malgraŭ ke por la hispana ĝenerala publiko la ekzisto de ĉi lastaj poetoj nesuspektatas aŭ, en la plej bona okazo, ignoratas, dum ili rigardatas stranguloj de la plej bela akvo, tiuj poetoj vivas, batalas kaj kreas samcele kiel la kolegoj verkantaj nacilingve. Aliflanke, iliaj kreaĵoj adresatas al legantaro senkompare malpli granda, kvankam certe pli diversa ol la hispanlingvaj poemoj de la kolegoj. Sen la neceso de tradukoj, iliaj poemoj

rekte trafas poeziemulojn de landoj ne nur hispanlingvaj, sed el la kvin kontinentoj. E-poetoj scias, ke iliaj versoj povas esti legataj de homoj tiel de Madrido kiel de Melburno, de Antananarivo, de Helsinko, de Tokio, de Nov-Jorko... Do iliaj lirikaj protestoj kaj pledoj fariĝas tuj internaciaj. Kaj eble tiu internacieco de ilia voĉo grande kaj spiritkarese kompensas al ili ties ĝeneralan nevideblon.

Ĉi-libre, verŝajne por la unua fojo en la historio de Esperanto, oni prezentas al la publiko la esperantigon de nacilingva antologio de difinita tipo de nuntempa poezio apendice aldonante al la kompilitaj poemoj originale esperantajn kontribuojn de E-poetoj al komuna temo. Ni koncernatoj: Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem, dankas la kompilanton Alberto García-Teresa pro ties entuziasma apogo al tiu ideo, kio honoras nin kaj Esperantujon.

MIGUEL FERNÁNDEZ



*La libro mendeblas pere de la libroservoj de UEA kaj SATeH.*



# Eta raporto pri la laboro de Sveda Laborista Esperanto-Asocio

2014 estis eventoplana jaro por SLEA. Ni decidis ŝanĝi la nomon de nia membrogazeto kaj samtempe refari ĝin dulingva kiel ĝi origine kaj longe estis. Ni ankaŭ decidis eldoni libron. Ni elektis traduki libron kiu en bona maniero priskribas la nunan situacion en Svedio, kie regas malcertaj dungitecoj.

Bedaŭrinde en tiu jaro ni perdis nian karan amikon kaj kamaradon Pelle Persson. Pelle, kiu dum jardekoj estis la ĉefa motoro de SLEA, partoprenis la decidojn sed bedaŭrinde ne ekvidis la rezulton.

Finfine en la komenco de 2015 alvenis "La Korto. Rakonto" de sveda verkisto Kristian Lundberg. Ni klopodis disvastigi ĝin kiel plej eble. Nuntempe vi trovas ĝin en Brazilo, Francio, Hispanio, Koreio, Nederlando kaj Usono. Ni ankoraŭ serĉas novajn landojn kaj ni volonte

interŝanĝas librojn kun aliaj partoj de la mondo. Ne hezitu kontakti nin!

Hodiaŭ SLEA havas ĉirkaŭ 30 membrojn sed ni ekkomencis varbadkampanjon kaj esperas trovi novajn membrojn. Ni klopodas videbligi nin ene de la laborista movado kaj krei intereson por la lingvo. Dum la jarkunveno 2016 ni denove decidis eldoni libron. Ĉi foje poemaro kun startpunkto el la kuireja laboro de la verkistino Jenny Wrangborg. Libro kiu priskribas laboron kaj lukton je ordinara laborejo en Svedio. Ni esperas prezenti ĝin dum la jaro.

Kamaradajn salutojn de

*Sveda Laborista Esperanto-Asocio*



## Nekrologo

# Tereza Kapista (1930-2016)



Tereza Kapista, prezidantino de Beograda Esperanto Societo mondkonata esperantistino hodiaŭ foriris en rememoro.

Ŝi estis esperantistino, instruistino de internacia lingvo Esperanto, hungarino el Serbio, sed monda civitanino. Ŝi travojaĝis la “tutan mondon”, multajn landojn sur kvin kontinentoj, instruante al homoj internacian lingvon Esperanto. Profesie ŝi estis emerita juristino, eĉ monda vojaĝanto, konata Esperanta instruistino. Ŝi instruis per rekta metodo. Eble ne ĝuste laŭ la reguloj de Haga Instituto, laŭ Marĉeka lernolibro, Zagreba metodo – ŝi kompilis ĉiujn tiujn manierojn de lernado kaj faris propran metodon, miksaĵon de ĉiuj, esplorita en praktiko en dudeko da landoj en kiuj homoj parolas pli ol dudeko da lingvoj. Interese estas, laŭ reagoj de instruataj homoj – ĉiam sukcese. Okazadis tiuj ŝiaj instrueroj en tre diversaj lokoj, en modernaj lernejoj, en skoltaj tendaroj, en kabanoj, en klerigaj centroj, inter infanoj, iranaj virinoj, afganaj rifuĝintinoj, malriĉaj burundaj knaboj, inter hungaroj, serboj, rusoj, turkoj, bosnianoj, brazilanoj, novzelandanoj – mi ne povus nombri ĉiujn kiuj estis ŝiaj gelernantoj kaj kiuj estis ŝiaj geamikoj.

Ŝi naskiĝis en Subotica la 11-an de aprilo 1930. Ŝi esperantiĝis en la jaro 1985. En Esperanto Instituto en Hago-Nederlando, ŝi akiris Cseh-metodan instruistan diplomon, estis D kaj FD por Cseh-metodo de UEA. Ŝi laboris kaj estis emerita kiel juristino, sed

ankaŭ finis Pedagogian Akademion. Ekde 1996 ŝi estis vicprezidanto de Beograda Fervojista Esperanto-Asocio. Ŝi ĉeestis Universalajn Kongresojn 10-foje, ILEI-porinstruistajn kongresojn 7-foje, SAT-kongresojn 9 fojojn, IFEF-kongresojn 12-foje... En multaj kongresoj ŝi prelegis kaj gvidis kursojn. Kursojn komence ŝi laboris laŭ Zagreba metodo, poste laŭ Cseh-metodo kaj foje laŭ Gerda Malaperis. Eksterlande ŝi gvidis kursojn en Hungarujo, Germanujo, Francujo, Nederlando, Italujo, Brazilo, Pollando, Aŭstralio, Nov-Zelando, Ukraino, Turkujo, Japanujo... pli ol 130 diversajn kursojn de diversaj niveloj. Entute ŝi vizitis 54 landojn (en ĉiuj kontinentoj) ĉiam faranta ion por Esperanto.

Ŝi okupiĝis ankaŭ pri eldonado. Ŝi aperigis propran tradukon al Esperanto de libro de Tibor Sekelj “Temuĝin la filo de la Stepo” (1993), la libron de Branimir Sćepanović “Buŝo plena je tero”, (1994) kiun elserbigis Antonije Sekelj, verkis librojn: “Esperanto – Lingvo de Paco en Irano” pri la realigita projekto de UEA, “Esperanto – Lingvo de Paco en Burundo-Afriko” (eldonis en 2005 proprakoste), *Ie pri Io* (2012).

Plurfoje ŝi korektis tekstojn de E-tradukantoj, ankaŭ helpetis iom en Nova PIV kiun eldonis SAT en la jaro 2003. En 2005 ŝi estis la redaktoro de poem-kolekto “Miozoto” de Margarethe-Greta Stoll. Ŝi estis ano de Pasporta Servo, gastigis multajn amikojn el Koreio, Japanujo, Rusujo, Turkujo,

Hungarujo, Rumanujo. Italujo, Bulgarujo, Germanujo, Pollando, Francujo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Ĉinio ktp. En 2008 ŝi tradukis al la serba la lernolibron per rekta metodo kiun verkis Stano Marĉek.

Ŝi kredis ke Esperanto estas tre grava rimedo por pli bona kompreno inter homoj. Lastajn tridek jarojn de sia vivo ŝi dediĉis al sukcesa aplikado de tiu ideo en la praktiko. La Esperanto-movado per ŝia foriro perdis multon. Ripozu en paco, kara nia kamaradino!

DIMITRIJE JANIČIĆ

NdR: Tereza Kapista (matr. 34712) estis la ĉefa organizanto de la SAT-Kongreso en Beogrado (2006) kaj rolis kiel SAT-peranto inter 2011 kaj 2016. Nuntempe, ŝi estis kunorganizanta la venontan SAT-Kongreson okazigotan en Serbio (2018).



## Novaj aliĝoj

36054	LAMICHHANE Sandip	NP - KATHMANDU	Nepalo
36055	PHUYAL Sudhir	NP - KATHMANDU	Nepalo
36056	PHUYAL Sunil	NP - KATHMANDU	Nepalo
36057	DHUNGANA Danda-Pani	NP - KATHMANDU	Nepalo
36058	MONTERO MEDINA Juan Carlos	CU-11000 - LA HABANA	Kubo
36059*	HAN Sugheui	KR-51793 - CHANGWON-KYEONGNAM	Koreio

# Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2015 ĝis Majo 2016

## Plenum-Komitato

La PK kunvenis la 30an de majo, la 11an de julio, la 8an de aŭgusto en Nitro (kun anoj de ĜK-aro), la 12an de septembro, la 7an de novembro 2015, la 5an de decembro, la 23an de januaro, la 27an de februaro, la 2an de aprilo, kaj la 28an de majo 2016. Plej multaj partoprenantoj partoprenas pere de komputila telefonado kaj tujmesaĝado, kaj la ceteraj ĝenerale komentas la traktitajn punktojn per retmesaĝoj. Pierre Soubourou (Ŝtonĉjo) demisiis en novembro 2015. Post alvoko al novaj kandidatiĝoj, la PK ekde februaro akceptas kiel konstantan gaston k-don Amparado Cisnero, kiu donas sian opinion pri la traktitaj punktoj, sed ne partoprenas en la decidoj.

## Administrado

La membrosliparo estas mastrumata de Bruno Henry kun helpo de Vinko Markovo. Guy Cavalier zorgas pri leteroj alvenintaj en Parizo, pri reekspedo de Sennaciulo, kaj ĝisdatigo de la leĝa dosiero pri aperraĵto por Sennaciulo. Diana Riŝar kribras la mesaĝojn alvenantajn ĉe la oficiala retadreso de SAT (unue satesperanto@free.fr, kaj poste kontakto@satesperanto.org).

## Sidejo

La sidejo de SAT utilas kiel stokejo por nuntempe vendataj libroj kaj freŝdataj gazetaj kromekzempleroj. Ĝi samtempe estas konsultejo pri administraj dokumentoj, malnovaj

eldonoj kaj diverstipaj historiaj dokumentoj. Plurajn fojojn jare venas petoj de historiistoj aŭ unuopaj interesigantoj, kiuj necesigas detalajn esplorojn tra tiu materialo.

## Adresaro

Revok-kampanjo okazis dum somero 2015 por doni al malnovaj membroj, kiuj delonge ne iel signis, la eblecon elekti, ĉu ili deziras plu ricevi Sennaciulon, aŭ ĉu ili volas esti forigitaj el la membrolisto. La papera adresaro estas enpaĝigita de Ĝilo Perez.

## Rilatoj kun LEA-oj kaj SAT-rondoj

Aperis en Sennaciulo informoj pri aktivaĵoj kadre de SATeH kaj SLEA. Ankaŭ SAT-anoj el Sapporto, Japanio, kaj el Koreio, informis pri siaj agadoj pere de Sennaciulo. Reprezentantoj de la PK en la LEA-Komitato estas Guy Cavalier kaj Pedro Sanz.

## Membraro

Je la 21a de majo la membraro de SAT konsistas el 526 membroj, el kiuj 209 repagis sian kotizon por 2016, al kiuj aldoniĝas 13 kotizoj rekte pagitaj per la solidarservo. 335 kamaradoj pagis minimume por 2015, kaj estas 158 malfruantoj. Malkresko de pli ol 120 malfruantoj sekve de la revokkampanjo dum somero 2015.

La ĉi-kuna tabelo resumas la nunan strukturon de la membraro. Inter la malfruantoj povas aperi kamaradoj, kiuj neniam pagis aŭ por kiuj aparta sumo estis formale provizita de la solidarkaso lastfoje en 2013.

(Vidu tabelon)

Dum la jaro mortis 8 kamaradoj kaj aliĝis 24 novuloj (de 36038 ĝis 36062). Novuloj ricevas, aldone al numeroj de Sennaciulo pri la kuranta jaro kaj adresaro, 8-paĝan paperan bonvenigtekston.

## Dissendolistoj de SAT

La Iperrondo de SAT, publika diskutejo malfermita al ne-SAT-anoj, estas daŭre mastrumata de Petro Levi kaj Dieter Rooke. En ĝi membras 92 homoj. En SAT-diskuto, la ĉefa interna interŝangejo de SAT, estas registritaj 144 retadresoj. Ioma malkresko kompare al 2015 ŝuldiĝas al forigo de retadresoj de mortintaj kamaradoj. La mesaĝonombro variis inter 60 kaj 254 monate. Mastrumas la liston Djémil Kessous, Bruno Henry kaj Vinko Markovo.

## Retejo

La retejo de SAT enhavis 2388 artikolojn je la 29-a de majo. La meza vizitantonombro konstante kreskis de 350 en majo 2015 ĝis 750 en novembro, kaj havis duan pli rapidan kreskofazon de 700 en januaro ĝis iom pli ol 1500 fine de marto.

La plej grandan parton el la ĉirkaŭ 200 publikigitaj novartikoloj ŝuldiĝas al la laboro de Hans-Georg Kaiser (Cez) en la SAT-Kulturpaĝoj. Dominiko Simeone (paĝoj de liberpensula frakcio) kaj Vinko Markovo (temaro de Sennaciulo, ĝisdatigo de administraj informoj). La tehniko prizorgado de la retejo (savkopioj, servilo kaj ĝenerala aspekto) daŭre estas plenumata de Frederiko Scibor.



Pli ol 800 artikoloj, plejparte ne-definitivaj versioj el artikoloj aperintaj en Sennaciulo en 2006-2009 kaj ekde 2015 daŭre atendas finpoluradon kaj publikigon en la interna spaco de la retejo. La interna spaco de la SAT-retejo daŭre uziĝas por la redaktado de Sennaciulo kaj SR.

## Landaj perantoj

SAT havas perantojn en 27 landoj, kaj plie havas izolitajn membroj en 27 landoj senperantaj. K-do Daiŝin sukcesis ricevi mastrumrajtojn sur la SAT-konto en Japanio, blokita ekde la morto de Tani Hiroyuki en aŭgusto 2014, kaj ĝiri al SAT parton el la malfruantaj kotizpagoj. Por Bulgario kaj Germanio, la perantajn taskojn transprenis respektive Dominik Schramm kaj Metodi Markov. SAT nun denove post pli ol jardeka interrompo havas peranton en Ĉinio, Bruno Henry, kaj ne plu havas de kelkaj monatoj peranton en Serbio, pro la forpaso de Tereza Kapista.

## Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo

La konsisto de la redaktoskipo, klarigita en la kolofono, restis konstanta dum la tuta jaro, kio ebligis rekapti regulecon en la aperritmo. Dufoje okazis unumonata malfruo, por la numero 9-10 pro la atendo de SR antaŭ sendo presejen, kaj por la numero 3-4 pro miskompreno kun la presisto, kiu ne tuj trovis la provizitan dosieron. Tiajn malfruojn eblus verŝajne plene eviti havante plian kunordiganton, kiu povus aparte fokusiĝi pri la redaktado de Sennacieca Revuo. SR estas enpaĝigita de Ĝilo Perez, kunlabore kun la redaktoskipo de Sennaciulo.

Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo havas 34 abonantojn (el kiuj 17 malfruas) en 12 landoj kaj estas senditaj al 54 gazetoj aŭ asocioj interŝanĝe. Du interesiĝantoj, momente nek membroj nek abonantoj, ricevas ĝin senpage.

## Eldona Fako Kooperativa

Leĝaj respondeculoj de la kooperativo estas Veroniko Girard kaj Vinko Markovo. Guy Martin plie helpis

Lando	Pagintoj	Malfruantoj	Solidarkaso	Sumo
Argentinio	3	1	2	6
Aŭstralio	7	0	0	7
Aŭstrio	3	0	0	3
Barato	1	0	0	1
Belgio	9	0	0	9
Bosnio	6	1	0	7
Brazilo	2	7	0	9
Britio	11	6	0	17
Bulgario	10	6	0	16
Ĉeĥio	5	0	0	5
Ĉinio	2	0	0	2
Danio	3	1	0	4
Finnlando	2	0	0	2
Francio	110	44	0	154
Ganao	0	1	0	1
Germanio	22	3	1	26
Grekio	1	0	0	1
Haitio	0	1	0	1
Hispanio	26	6	0	32
Hungario	3	2	0	5
Islando	2	0	0	2
Italio	12	0	0	12
Izraelio	2	0	0	2
Japanio	10	26	0	36
Kanado	1	0	0	1
Koreio	14	3	0	17
Kroatio	7	2	0	9
Kubo	0	0	6	6
Latvio	1	0	0	1
Litovio	3	0	0	3
Luksemburgio	1	1	0	2
Malagasio	0	0	9	9
Makedonio	1	0	0	1
Malio	0	1	0	1
Meksikio	0	2	0	2
Mongolio	0	1	0	1
Nederlando	10	4	0	14
Nepalo	0	0	4	4
Norvegio	2	0	0	2
Pollando	3	3	0	6
Portugalio	4	0	0	4
Rumanio	0	2	0	2
Rusio	1	11	2	14
Salvadoro	0	1	0	1
Serbio	12	10	0	22
Slovakio	1	0	0	1
Slovenio	0	1	0	1
Svedio	8	3	0	11
Svisio	7	0	0	7
Tajvano	2	0	0	2
Tanzanio	0	0	1	1
Togolando	0	0	7	7
Ukrainio	0	5	0	5
Usono	5	3	0	8
<b>Sume</b>	<b>335</b>	<b>158</b>	<b>32</b>	<b>525</b>

en ordigo de la kontad-dokumentoj. La dissendolisto "SAT-EFK", kiu uzigas por diskuti eldonprojektojn, enhavas 35 membrojn.

"La laborista esperanto-movado en perspektivo" estis eldonita 200-ekzemplere en aprilo 2016, kaj "La rejnoro" eldoniĝis samtempe 100-ekzemplere. "La silento de l'armiloj", tradukita romano de Bernard Clavel, pretas por enpaĝigo. Du aliaj proponoj pri reeldono de malnovaj libroj sub formo de bitlibroj, "Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto" de Lucien Péraire, kaj "Vortoj de Macue Sasaki", pendas pro demandoj pri aŭtorrajtoj. Plu kolektiĝas materialo por libro pri la unua mondmilito el diverslandaj perspektivoj. Daŭre pendas la demando pri eldono de novaj T-

ĉemizoj, inkluzive de la administra flanko. La dokument-filmo "Esperanto" de Dominiko Gaŭtiero estis publike prezentita en Vieno kaj en Nanto, sed malpli multe vendiĝas ol en 2013-2015.

## Poresperanta Fakoj

La kunsido de la Poresperanta Fakoj dum la kongreso en Nitro utilis por pripensi la refreŝigon de la flugfolio pri SAT eldonita en 2010.

Deklaracio de la 89-a SAT-Kongreso estis tradukita al la angla, franca, germana, hispana, pola kaj sveda lingvoj.

## Venontaj kongresoj

La PK kuraĝigis k-dojn el Koreio prepari kongresproponon por Seulo inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto, dum k-doĵ el Kragujevac, Serbio, konsentis ŝovi la preparon de la tiea kongreso al 2018. La propono el Lesjöfors, Svedio, povus esti por 2019 (konfirmenda), kaj por pli postaj jaroj estas kontaktoprovoj en Tunizio kaj Kubo.

# Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2015-2016

## 1- Rememorigo de la funkcio de Ĝenerala Konsilantaro

"La Ĝenerala Konsilantaro helpas la PlenumKomitaton per siaj informoj kaj konsiloj. Ĝi plie observas kaj kontrolas la agadon de la PlenumKomitato. Se la Ĝenerala Konsilantaro rimarkas, ke tiu agado ne estas honesta kaj laŭstatuta, ĝi rajtas konigi siajn konstatojn al la tuta membraro per presorgano. La Ĝenerala Konsilantaro prezentas raporton antaŭ ĉiu Kongreso. Ĝi rajtas demandi al la PlenumKomitato pri ĉiuj aferoj kaj postuli respondon".

## 2- Membroj de Ĝenerala Konsilantaro

**La membroj de ĜK-aro de la kategorio A**, t.e. la membroj por geografiaj sektoroj elektatis rekte per referendumo de la tuta anaro kun membroj de la PlenumKomitato. Ili elektatas por la periodo 2015-2018,

Renata Chassard-Caubel por aĝena SAT-rondo,

Koffi Gbeglo por lomea-aneha SAT-rondo

Nikolao Gudskov por Moskvo

Hyunsoo Jung alinome Paz, por Seula SAT-rondo

**La membrojn de ĜK-aro de kategorio B**, t.e. membrojn de Konflikto-Komisiono elektas Kongreso,

Vincent Charlot

Petro Levi

José Maria Salguero

**Membro de ĜK-aro de kategorio C**, t.e. reprezentanto

de membraro el urbo, kie sidas la PK

Vincent Charlot

**Membrojn de ĜK-aro de kategorio Ĉ**, t.e. reprezentantoj de LEAoj konvencie ligitaj al SAT proponas koncerna LEA,

Karlo Bourlot por ILEA,

vakas por SATEB,

Gary Mickle por LEA/G,

Inga Johanson por SLEA,

José Maria Salguero, alinome Kani, por SATEH,

Serĝo Sir' por SAT-Amikaro

vakas por SATEJ.

**Membrojn de ĜK-aro de kategorio D**, t.e. membroj de fakoj funkciantaj ekster sideja urbo

Robin' Beto por Poresperanta Fakoj

Vito Markovo por Eldona Fakoj Kooperativa.

## 3- Aktivaĵoj de Ĝenerala Konsilantaro

Nenia grava rimarko pri protokoloj de PK-kunveno dum la pasinta agadjaro. La sendo de la protokoloj cetere okazis akurate.

## 4 - Konflikto-komisiono

Neniu plendo atingis nian triopon de la lasta kongreso.

VINCENTO CHARLOT

*Sekretario de Ĝenerala Konsilantaro de SAT*



## Dumkongresaj laborgrupoj

Kadre de la venonta kongreso en Herzberg am Harz estos organizataj kvar laborgrupoj por pritrakti jenajn temojn :

- Sennaciulo
- Kontakto kun izolitaj membroj
- Kontaktoj kun fratorganizoj neesperantistaj
- Retejo

El la kvar temoj « kontaktoj kun fratorganizoj » neesperantistaj estas iom nekutima, sed ni plurfoje dum la lastaj jaroj konstatis ke ni ne sukcesas sufiĉe okupiĝi pri tio ĉi, do eble ideoj kaj sinproponoj povus aperi dum kongresa laborgrupo.

Kontakto kun izolitaj membroj estas grava afero, kiun ni ankoraŭ ne sukcesas kontentige disvolvi.


Pri nia retejo : Frederiko Scibor, kiu prizorgas la SAT-retejon, informis ke baldaŭ devos okazi sufiĉe grava ĝisdatigo el tehniko vidpunkto. La retejo estis konstruita antaŭ dek jaroj, kaj kelkaj aferoj – interalie la maniero pritrakti la plurlingvecon – eble ne plu eblos en pli freŝdataj versioj de SPIP. Pro tiu ĝisdatigo, povas esti oportuna momento kolekti ideojn pri ŝanĝoj bezonataj aŭ dezirataj en la strukturo kaj aspekto de la retejo.

Ĉiuj proponoj por evoluigi tiun skizon bonvenas.

*Plenum-Komitato de SAT (18/06/2016)*

## EL LA LETERKESTO

# Dosiero de Subjekto N-ro 1218 - Rakonto de Bulgara Anarkiisto



La aŭtobiografio de nia maljuna kamarado, Aleksandro Nakov, liberecano kaj SAT-ano el Bulgario, kiu travivis multajn jarojn en faŝismaj kaj bolŝevismaj malliberejoj kaj koncentrejoj, estas nun tradukita al la angla. Aleksandro partoprenis SAT-kongreson en Beogrado (2006) kaj la libro enhavas ĉapitron pri Esperanto. Por tiuj, kiuj komprenas la anglan, la eldonejo Black Cat Press en Kanadio ĵus eldonis tiun libron kaj ekzemplerojn jam aperis ĉe anarkiisma librofoiro lastatempa ĉe Lethbridge (Letbriĝo) en Kanadio. Jen retpaĝo : <http://blackcatpress.ca/Nakov.html> La unua bulgarlingva eldono aperis en 2006, kaj la dua en 2009.

**Ĉu oni nun traduku ĝin al Esperanto ? Komence, jen jam traduko de la anglalingva prezentoteksto.**

ROB BLOW

ALEXANDER NAKOV, naskiĝis 1919 : “duagrada edukado en faŝismaj malliberejoj... altdukado en bolŝevismaj malliberejoj”

Inter la malmultaj kiuj transvivis la teruraĵojn de bulgaraj koncentrejoj stalinismaj, Aleksandro Nakov estas eble la plej reprezenta el la malnova generacio de aktivaj kaj engaĝiĝintaj anarkiistoj. Komence malema skribi siajn memoraĵojn, Aleksandro estis poste persvadita fare de amikoj, ke liaj travivaĵoj devas esti rakontitaj. Kaj dirante tiun rakonton, li nun restas ia esenca ligo inter la anarkiismaj aktivuloj de la pasinteco kaj la junuloj de hodiaŭ.

En klara kaj konciza prozo, Aleksandro skizas siajn agadojn dum sia juneco, sian postan malliberigon kaj sian furiozan reziston al barbara sistemo. Aldone al liaj memoraĵoj, tiu libro ankaŭ enhavas oficialajn registarajn kaj ŝtatajn dokumentojn sekurecajn pri la aŭtoro – dokumentoj kiuj donas alian komprenon pri la anarkiisto, Alexander Nakov, celita de la 'popola ŝtato' kaj klasifikita kiel 'Subjekto N-ro 1218'.

# LANDAJ PERANTOJ

## Aŭstralio – Franciska Toubale

1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio  
rete : fran14@bigpond.net.au

## Belgio – Claude Gladly

Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE  
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916

Rete : cglady@arcadis.be

Bankkonto : 750-6373051-18

IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22

## Bosnio-Hercegovino – Ivica Horvat

Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino  
rete : ivica.h@hs-hkb.ba

## Brazilo – José Joaquim Lunazzi

R. Manoel Antunes Novo, 668, BR-13084-157  
Campinas-SP., Brazilo

rete : lunazzi@esperanto.cc

## Britio – Arturo Prent

7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio  
tel. : +44.1.277.22.89.62

Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"

Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003

BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003

rete : ap\_esp-sat21@yahoo.co.uk

## Bulgario – Metodi Markov

Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario

tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 87904003

rete: mam1948@abv.bg

IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF

## Ĉeĥio – Václav Stibůrek

J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio

tel. : +420.737230231, rete : stiburek.v@seznam.cz

IBAN : CZ6620100000002900048738

BIC/SWIFT : FIOBCZPPXXX

## Ĉinio – BRUNO GUY CLAUDE HENRY

rete : esperanto.bhenry@yahoo.fr

Bankkonto N°6217857500009246684

SWIFT kodo/BIC : BKCHCNBJ970

BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan

Furong Road (M) CHANGSHA - HUNAN-ĈINIO

## Danio – HENRIKSEN Kim

Hallandsgade 6; DK-2300 COPENHAGEN

rete: kimjezus@gmail.com

## Francio – Barthélémy Maurau

Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE

FR-27000 EVREUX, Francio

rete : barthelemy.maurau@free.fr

Bankkonto : 1733310 N 020

IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070

BIC : PSSTFRPPPAR

## Germanio – Dominik Schramm

Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO

rete : dominik.schramm@gmx.net

senpagaj internaciaj ĝiroj eblas rekte al la konto "SAT" ĉe

"La Banque Postale, Paris" :

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC : PSSTFRPPPAR

## Hispanio – Pedro Maria Sanz Sanz

C/Mar de Fora 13, esc.iszqda., 3-B, ES-28400 Collado

Villalba, Hispanio

rete : pedrosanzsat@gmail.com

Konto : 0227-0001-85-0200526929 - banko

apartenanta al BBVA

IBAN: ES04 0227 0001 8502 0052 6929

BIC: UNOESM1XXX

## Hungario – Tóth Zsolt

Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario

Tel : +36-20-5188919 , rete : zstoth75@gmail.com

Bankkonto : 11773377-00000354

IBAN : HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000

BIC : OTPVHUHB

## Italio – Carlo Bourlot

Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio

rete : carlo.bourlot@gmail.com

Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993

Poŝtkonto : n-ro 43976158

Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,

Kodo BIC : BPPIIRXXXX

## Izraelio – Jehoŝua Tilleman

97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio

rete : b48705544@013.net

## Japanio – Nakamura Daiŝin

Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo

rete : sat-peranto-japana@googlegroups.com

Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon

## Koreio – Jung Hyunsoo (Paz)

Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu

KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do

rete : paze23@gmail.com

## Kroatio – Ivica Šćepanović (Truto)-poŝte

Otok Brac, HR-21414 Gornji Humac, Kroatio

Tel : +385.21.647.059, Poŝtel : +385.098.182.79.07

rete : ivica.scepanovic@st.t-com.hr

Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka

IBAN : HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC : SOGHR22

## Litovio – Gražina Opulskienė

Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio

Tel : +37068736457, rete : grazopul@yahoo.com

Bankkonto : LT347300010001720030

BIC/SWIFT kodo : HABALT22, Swedbank

## Malagasio – Justine (Lala) Ralalarisoa

Lot IIC - 72 - FD Manjakarary, MG-101

Antananarivo, Malagasio

rete : lrespr@libero.it

IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112

BIC: BMOIMGMG

## Norvegio – Cécile Anda

Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio

## Portugaliao – Manuel Luis Pedrosa Alves

Estrada Principal, 79, Morelino, PT-2710 Sintra, Portugaliao

rete : morelino\_sintra@hotmail.com

## Rusio – Nikolao Gudskov

a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio

rete : nikolao@orc.ru

## Svedio – Inga Johanson

Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio

rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com

Poŝtkonto : Svenska arbeteesperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8

IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608

BIC : NDEASESS

## Svisio – Richard Schneller

Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio

rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1

## Tajvano – CHO Chaoming

12F2, No. 41 , Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung

rete : cmcho@so-net.net.tw

## Ukrainio – Andreo JANKOVSKIJ

str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio

rete : classs@bigmir.net, telefono : 380 67 99 470 03

## Usono – Brandon SOWERS

2341 Jefferson Dr, US-GA 30350 SANDY SPRINGS, Usono

rete : nigrakajrugxa@gmail.com

Konto #631382, ĉe kredit-uniĝo "Spire".

## Aliaj landoj

SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio

rete (ĝenerala retadreso) : kontakto@satesperanto.org

rete (pri financaĵoj) : financoj@satesperanto.org

Tel: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC : PSSTFRPPPAR

eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-

aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal :

financoj@satesperanto.org

## Sennaciulo

Oficiala organo de SAT

## Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta,

FR-75020 Paris, Francio

Retadreso: kontakto@satesperanto.org

Reĵeto: http://satesperanto.org

Tel: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto:

SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Diana Riŝar

Kasisto: Bruno Henry

Membroj: Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz,

Dominiko Simeone

## Sennaciulo

Redaktoskipaj kunordigantoj: Vinko Markovo, Pedro Sanz

Enpajliganto: Nicolas Raymond

Ceteraj redaktantoj: Djémil Kessouf, Gary Mickle, Grazina

Opulskienė, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller,

Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale.

Kontribuojn sendu elektronike al:

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,

FR-75013 Paris, Francio

Pri financaĵoj aferoj sendu al:

financoj@satesperanto.org

Libromendojn sendu al:

libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al:

pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Impriĉe par/Presta de:

TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas dumonate - Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono:

France 39 €

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la

SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution:

N° CPPAP 05 20 G 86567

- > Por la nemenciitaj landoj la aliĝo al SAT estas 5 € kaj la PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.
- > Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo
- > Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- > Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
- > Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.
- > Pagante 75 % de la plena kotizo por la koncerna lando, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.
- > La kotizo estas pagenda al: poŝtkonto n-ro 1234-22 K Paris, aŭ la landa peranto de via regiono.

## KOTIZOJ 2016

Lando	Jarkotizo	Lando	Jarkotizo
Argentino	27 €	Japanio	7000 JPY
Aŭstralio	52 €	Kanado	81 CAD
Aŭstrio	52 €	Koreio	33 €
Barato	12 €	Kroatio	12 € (90 HRK)
Belgio	52 €	Latvio	12 €
Bosnio-Herc.	10 €	Litovio	12 €
Brazilio	22 €	Malagasio	5 €
Britio	45 GBP	Makedonio	5 €
Bulgario	12 €	Malio	5 €
Ĉeĥio	20 €	Mongolio	12 €
Ĉinio	45 CNY	Meksikio	15 €
Danio	52 €	Nederlando	52 €
Estonio	12 €	Norvegio	52 €
Finnlando	52 €	Pollando	12 €
Francio	52 €	Portugaliao	30 €
Germanio	52 €	Rusio	12 €
Grekio	5 €	Serbio	12 €
Haitio	5 €	Slovakio	12 €
Hispanio	40 €	Slovenio	12 €
Hungario	12 €	Svedio	52 €
Israelo	32 €	Svisio	79 CHF
Islando	33 €	Ukrainio	12 €
Italio	50 €	Usono	74 USD

DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €

34 | Sennaciulo | MAJO – JUNIO 2016

## DONACINTOJ

### Solidarkaso

RIVIÈRE Jimmy 21,00 CHF

SCHNELLER Richard 21,00 CHF



# La flugo

Ili tuj venos! Hastas vi fenestren.

Venas

surtrotuare trio da beluloj  
en modparadaj vestoj, kun po unu ledteko  
kaj la firma paŝad' de kiuj havas  
kiel koron dekretojn kaj biletojn.

El la trio, du estas el la banko  
hipoteke mastranta vian domon.

La tria 'stas la leĝo, kiu defendas ilin.

La leĝo, kiun faras la regantoj  
nome de la popolo, vianome.

La tri belulojn eskortadas grupo  
da gardantoj de l' ordo –de la ordo ilia–,  
pagataj de ni ĉiuj, do ankaŭ de vi mem,  
same kiel iliaj religio

kaj skandalaj pensioj de Dubajo-vintrantoj,  
de uzantoj de frako kaj cilindra ĉapelo.

Kiel la elaĉeto de iliaj bankoj,  
kiujn ili faligas en ruinon

kalkulante per nova regulo de subtraho:

“el dek retenu naŭ”. Kaj spite tion ili plu liberas!

Jen ili venas nun vin eldomigi,

pro tio, ke la ŝuldon vi ne pagas,

kvankam ili scias,

ke havas vi nek monon nek laboron. Nenion,

krom io plej malinda esti nomata vivo.

Jen ili, sube, jame,

armitaj venas rompi vian pordon,

vin eldomigi bruske, se vi rifuzos cedi.

Kaj vi rifuzos cedi,

sed certe vin neniu eldomigos.

Jen ili sube. Vi, ĉe l' sojl' fenestra

etendas dis viajn flugilojn tremajn

preta komenci senrevenan flugon,

la solsolan aktivan, kiun al vi permesas


la beluloj, kaj ni pro nia mutio.

MIGUEL FERNÁNDEZ






Idomeni (p. 7)



Hispana kritika poezio en Esperanto (p. 27)



La KancerKliniko (p. 25)



Daŭripovo – Resilienco – Transformo (p. 19)